



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
Majo 2020 n-ro: 53



RESTU HEJME

Merhaba,

Korona virüsü günlerinde evde kalırken sıkılmamanız için size Turka Stelo dergisinin Mayıs 2020 sayısındaki yazıları okumanızı tavsiye ediyoruz.

Bu sayıda arkadaşımız Konuralp'in Mühürlenmiş Zaman köşesinde "**Theo Angelopoulos**" filmlerine dair yazı var.

Almanya'dan Ulirch Wilke gönderdi: "**Alexander von Humboldt**" un hayat hikayesi.

Bulgaristan'dan Ivanička Mağarova'nın bir hikayesi: "**S.O.S**".

Korona virüsünden henüz yeni kaybettiğimiz değerli esperantist Julia Sigmond'tan bir "**Dialog**".

Yunan mitolojisinden Spiros Sarafian'ın hazırladığı "**Danao ve Danaidler**" ile ilgili hikaye.

Ayrıca bir çok başka metin, şiir, fıkra ve bulmaca da derginin içeriğinde mevcut.

Hepinize iyi okumalar !

Saluton,

Dum la kronvirusaj tagoj restante hejme, por ke vi ne enuu ni proponas, ke vi legu la tekstojn en la maja numero de nia Turka Stelo revuo.

En ĉi tiu numero eble la plej intresa teksto estas tiu de nia amiko Konuralp, en sia angulo Tempo Sigelita, la artikolo pri la filmoj de "**Theo Angelopoulos**".

El Germanio sendis Ulrich Wilke: vivrakonto de "**Alexander von Humboldt**".


El Bulgario rakonto de Ivanička Mağarova: "**S.O.S**".
La "**Dialogo**" de Julia Sigmond, la esperantistino, kiu jam forpasis pro la kronviruso.

El la greka mitologio verkis Spiros Sarafian: "**Danao kaj Danaidoj**".

Krom tiuj estas multaj aliaj teksto, poemoj, anekdotoj kaj krucvortenigmo.

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:


Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Ciklo kun Hori Jasuo	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Tempo Sigelita	4
DANAO – DANAIDINOJ (ΔΑΝΑΟΣ – ΔΑΝΑΪΔΕΣ)	6
Kia estis... (Milyen volt...)	8
Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (parto4)	9
Alexander von Humboldt	10
Astrologio kontraŭ Psikologio	12
Astrologio kontraŭ Psikologio - Majo / Virbovuloj	12
Pripensanta Kaoson	13
Ŝercoj	14
Kurcvortenigmo	14
La riĉeco de Julian Modest	15
El la libro de "Dao de Jing" (44)	16
Blogo de murdoplananto	16
Franco KAFKO (Franz Kafka)	17
Ne dubu mia kara	19
Muso kaj Rato	19
Amuza Matematiko	19
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	20
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	21
Ne manpremu	21
Patrino kun bebo (1989)	22
Funebro por Gandolfo	22
Pri tio, ke leono pensas pri virina puntilio	23
La kato kaj la pasero	25
Poemoj de Omar Seguna	26
Dialogo	26
Tragedio pro la atombomboj (parto 7)	27
S.O.S.	29
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj. Pro la kronviruso kaj kvaranteno estas neniu ebleco aktivi pri Esperanto lingvo.

Ciklo kun Hori Jasuo -- poemoj de Elena

SUMOISTOJ

En la sumoo
venkas ne nur la forto,
sed la saĝeco.



PATRIOTO

Patrioto eĉ
inter la bestoj... Estu
puraj la maroj!



PANO

Pecet' da pano
mankas al multaj homoj.
Sinklinon al pan'!



NEĜA HOMO

Belega estis
la Neĝa homo
kun siaj vestoj.
La infanoj festis.



Tage la suno
ĝin kisis senĉese
kaj ĝi ekploris,
ploris, ploris...

La Neĝa homo
ankaŭ havas koron...

verkis kaj sendis **Elena Popova** el
Bulgario
bildoj de **Hori Jasuo** el Japanio



Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



La 62-a Internacia Esperanto-Sumoo de la 15-a ĝis la 29-a de marto 2020

Analizo

Partoprenantoj: 307 el 38 landoj

Laŭlandaj nombroj:

1. Japanio: 61
2. Brazilo: 32
3. Francio: 30
4. Ĉinio: 25
5. Pollando: 20
6. Rusio: 17
7. Britujo: 14
8. Svisujo: 12
9. Germanio/Nepalo: 11
10. Italio: 10
- ...
- 27: Turkio: 1
- ...

Perfektaj venkintoj (15 venkoj):

289 el 307 (94,1%)

Kvanto de legitaj paĝoj: pli ol 20000 paĝoj (averaĝe unu homo legas 60 paĝojn tage)

Dankon al la 19 prizorgantoj de la Sumoo (Ĉefprizorganto: Jasuo (Japanio))

Recenzoj de la marta Sumoo aperis: <http://www.esperanto-sumoo.pl/recenzojmar2020.html>

La 63-a Sumoo en majo okazos ekde la 10-a de majo dum 15 tagoj.

Ni planis ne okazigi la julian sumoo-n ĉijare, sed julie ne okazos Esperanto-aranĝoj en la mondo pro la kronviruso, do mi volas okazigi la julian sumoo-n.

Mia nova retadreso estas: **hori-zonto@r.water.sannet.ne.jp**



UEA



N-ro 865 (2020-04-22)

Filmo "Vizito al la Centra Oficejo" libere spektebla

La Malfermaj Tagoj de la Centra Oficejo de UEA kaj TEJO (mallonge MT) okazas dufoje jare, kutime en iu aprila kaj novembro sabato, ekde novembro 1994. [...]

N-ro 864 (2020-04-18)

Virtualaj eventoj anstataŭ la Malferma Tago kaj la UK en 2020

Kiel respondo al la kronvirusa krizo la Esperanto-komunumo, kiel la cetera mondo, ekorganizas virtualajn eventojn anstataŭ la nuligitajn aŭ prokrastitajn ĉeestajn konferencojn. [...]

N-ro 863 (2020-04-16)

Jarkolektoj de la revuo Esperanto liberaj por elŝutado UEA informas, ke aldona al la libera elŝuteblo de la n-ro 4/2020 de Esperanto (per uea.org/revuoj) ankaŭ eblas libere elŝuti ĉiujn jarkolektojn kaj numerojn de pli ol antaŭ unu jaro disponeblajn en la retejo de UEA. [...]

N-ro 862 (2020-04-11)

La Universala Kongreso en Montrealo prokrastita al la jaro 2022

UEA esperas, ke ĉiuj bone fartas. La sano de la kongresanoj kaj de ĉiuj homoj estas por ni la plej alta prioritato. Post zorga konsiderado de ĉiuj aspektoj de la kronvirusa tutmonda epidemio kaj ĝiaj sekvoj, la Estraro de UEA, la Centra Oficejo, LKK kaj la kongresejo en Montrealo venis al la konkludo, [...]

TEJO



Kontribuu al tria video pri la kronvirusa krizo

Kontribuu al la tria

epizodo de Esperantistoj kaj kronviruso! La limdato por sendi vian videon estas la 19-a de aprilo. Al nia rakonto pri la kronvirusa krizo partoprenis jam pli ol 50 esperantistoj el pluraj landoj de la mondo... [...]

Revuo Kontakto: nova numero pri la kronvirusa pandemio

Aperis la nova numero de Revuo Kontakto. La ĉeftemo estas la kronvirusa pandemio. [...]

Esperantistoj kaj kronviruso – Epizodo 2

En la dua epizodo de Esperantistoj kaj kronviruso, pli ol 30 homoj el 17 landoj rakontas pri kiel progresas la situacio rilate al la kronviruso – COVID-19 kaj kiel ilia ĉiutaga vivo ŝanĝiĝis. La pandemio estas afero ne nur... [...]

Kontribuu al nova video pri kronviruso

Post la sukceso de nia video en kiu esperantistoj de la tuta mondo rakontas pri la situacio en siaj landoj rilate al kronviruso, ni decidis kolekti novajn kontribuojn por fari duan epizodon. La situacio rapide ŝanĝiĝas kaj diversaj partoj... [...]

TEJO lanĉas du novajn projektojn en 2020 kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo

Du novaj projektoj pri homaj rajtoj kaj socia inkludo estas entreprenataj de TEJO kunlabore kun la Konsilio de Eŭropo. Centro de Edukistoj pri Homaj Rajtoj: estu aktoro de ŝanĝo! Ĉi tiu projekto estas kunfinancata de la Junulara Fakto de... [...]



Leteroj de niaj legantoj



Kara,
Mi gratulegas vin pro la admirinda laboro favore al nia bela lingvo! La TURKA STELO estas vere elstara revuo (ne revueto) por ĉiuj esperantistoj!

Mi tutkore dankas vin pro la nun kompleta eldono de mia longa tradukado "La aŭtunaj muŝoj"! Jen granda honoro, kiu multe kortuŝas min.

Mikelo (Michel DEREYGER) el Francio



Estimata,
Koran dankon por via prizorgado pri Turka Stelo! Mi estas ĝoja vidi mian artikolon en ĉiu magazeno. Se vi permesos mian fojan provon, mi sendos la fablon de Tanabe Seiko en proksima tago.

Kacu Matoba el Japanio



La numero 52 de Turka Stelo atingis min en Dubai. Estas en ĝi kiel kutime rakontoj el la antikva mitologio, filozofiaĵoj, poeziaĵoj, amuzaĵoj, informaĵoj. Min atentigis ankaŭ la aktualaj, nome pri la forpaso de sinjorino Sigmund kaj ties edzo, same pri kronvira pandemio. Aldoniĝis nova rubriko pri la amuza matematiko. Gratulojn karaj! Amike **Bardhyl** el Albanio



Estimata,
Mi ĵus ricevis kaj legis la novan "Turkan Stelon". Eminentel! La revuo pli kaj pli bonkvalitas kaj varias. Vere riĉa kontribuo al la Esperanta kulturo!

Gratulon kaj dankegon!

Paulo S Viana el Brazilo

TEMPO SIGELITA

PEJZAĜO EN NEBULO (ΤΟΠΙΟ ΣΤΗΝ ΟΜΙΧΛΗ)

La nomon Theo(doros) Angelopoulos mi unuafoje aŭdis de mia amiko kaj filmdirektoro Mehmet Ulukan. Li estis tiom fervora pri li kaj entuziasma pri lia kinoarto, ke mi lian telefonnumeron registris en mia telefonlisto pere de la nomo Angelopoulos. Kaj ĝi ankoraŭ restas tiel nun en mia poŝtelefono. Mi iam kutimis imiti lin al nia jam forpasinta amiko, scenaristo kaj romanverkisto Sadik



Karli, kaj ni ĉiuj ridis kune. Eĉ iutage kiam ni renkontiĝis en iu filmfestivalo, Sadik de iom fore, laŭde alvokis lin per la nomo "Theo!". Jen kial mi konatiĝis kun la nomo Angelopoulos, pere de mia amiko Mehmet.

La unuajn filmojn, kiujn mi spektis estis 'Trupo' (Ο Θίασος), 'La Ĉasistoj' (Οι Κυνηγοί), 'Vojaĝo al Kitero' (Ταξίδι στα Κύθηρα), 'Pejzaĝo en Nebulo' (Τοπίο στην ομίχλη), 'La ŝneba paŝo de la cikonio' (Το μετέωρο βήμα του πελαργού), kaj 'La Abelbredisto' (Ο Μελισσοκόμος). Pli poste la filmo,

verkis kaj sendis Konuralp Sunal el Turkio

kiun mi spektis en Parizo, 'La rigardo de Odiseo' (Το βλέμμα του Οδυσσέα) kaj eĉ pli poste 'Eterneco kaj unu tago' (Μια αιωνιότητα και μια μέρα) kaj 'La herbejo kiu ploras' (Το λιβάδι που δακρύζει)... post tiu filmo mi pensis, ke Angelopoulos estis ripetiga sin mem. Sed ĝuste tiel, ke kelkaj literaturistoj diras "Romanverkisto fakte ripetigas la saman frazon en diversaj manieroj". Jes la rigardo de Angelopoulos al vivo, lia stilo, la maniero li uzis la scenojn estis tia kaj li tiel enigis sian nomon en la listo de majstroj de la 20-a kaj 21-a jarcento.



Antaŭ ol mi denove spektis la filmon 'Pejzaĝo en Nebulo' mi pensis pri la imagoj, kiuj restis en mia menso. Knabo kaj knabino. Gefratoj, kiuj serĉas sian patron. La soleca arbo en la fino de la filmo. Kiam mi vidas tian solecan arbon en la insulo sur kiu mi vivas aŭ en iu alia arbara loko ĝi ĉiam rememorigas al mi ĉi tiun filmon. Bela, fabela kaj malĝojiga filmo ĝi estis. Sed ĉi tiun filmon akompanis sona bildo, kiu identiĝinta kun la filmo ĝi ankoraŭ restis viva en mia menso ekde 30 jaroj. La melankolia temo muziko de Eleni Karaindrou *. La melankolia sono de hobojo. Ĉu eblas forgesi ĝin?!

Kaj kiam oni parolis pri Karaindrou la turka spektantaro rememoras pri Angelopoulos. La duo estis identigita. Ilia interkonsento estis io, kio venis el la koro, el la intuicio. Same al ĉiuj artistoj, kiuj integriĝas kaj faras bonan kunlaboron. Jen tio, kion Karaindrou rakontas pri tiu kunlaboro: "Angelopoulos estas homo, kiu sentas multe sed parolas malmulte. Pro tio, por ke mi povu rakonti pri tio, kio ne estas elparolata en la filmo, estis tre grava, ke mi devis

kompreni la ideojn, kiuj estis la bazo de lia laboro. Kelkfoje, eĉ antaŭ ol la scenario estis skribita, mi malkovris la ĉefan temon.” Jen, pro tiu bela kunlaboro, ni povis spekti tiujn poeziajn filmojn. Bedaŭrinde, ĉiuj leteroj, skriboj, notoj, libroj, filmoj de la majstro post lia morto cindriĝis same al la biblioteko de Aleksandrio. La fajro en Mati regiono de Ateno (2018) ankaŭ cindrigis lian domon. Tio rememorigis al mi pri la produktisto A, kiu serĉis pri la bobenoj de la filmoj de Manakis Fratoj, en la filmo ‘La rigardo de Odiseo’. Same al tiuj bobenoj perdiĝis ankaŭ la arĥivo de Angelopoulos . Ĉu ĝi estis ludo de historio? Manakis fratoj ankaŭ estas ligitaj kun la turka filmo-historio. Ĉar tiuj du fratoj vivis kaj estis civitanoj de la lasta periodo de Osmana Imperio. Ili ankaŭ dokumentis la osmanajn ceremoniojn pere de kinematografo.

La unuaj filmoj de Angelopoulos, kiujn mi spektis, daŭris 3-4 horojn. Oni vere bezonis paciencon por spekti tiujn filmojn. La filmo, kiu havis taŭgan daŭron por mi, por facila spektado, estis la “Pejzaĝo en nebulo”. La direktoro havis neniun zorgon alparoli al la ŝato de la spektantaro. Dan Fainaru en la jaro 1999 faris intervjuon kun Angelopoulos , kiu diris: “La nura kaj ĉefa koncerno de la film-industrio estas la enspezo de la giĉetoj. Ĉi tiu ja estas neevitebla sed la nura koncerno ne devas esti ĉi tiu. Mi kredas je tio: en iu ajn kampo, la veran ŝanĝon ne faras la publiko sed nur malgranda nombro de esceptaj homoj.”

Mi ĉi tie volas paroli nur pri la filmo ‘Pejzaĝo en nebulo’. Mi spektis ĉi tiun filmon dum filmfestivalo, kie la turka filmkritikisto Atila Dorsay invitis Angelopoulos sur la scenejo kaj faris mallongan interparoladon kun li. La filmo estas pri la Odiseado de du gefratoj, unu knabo kaj unu knabino, kiuj kaŝe vojaĝas el Grekio al Germanio post ilia malaperinta patro. Jen ebla resumo. Kelkaj aliaj interpretis ĝin kiel vojaĝo al la greka historio. Sed mi ĝin rigardas kiel vojaĝo al maturiĝo; la vojago de Voula, la pli aĝa fratino, kaj la frato Alexandros. Kiam oni kaptas la kaŝe vojaĝantojn kaj liveras ilin al la polico, ili estas ekdukondukitaj al ilia onklo. Pro la dialogo inter la onklo kaj polico ni komprenas, ke ili estas infanoj de eksteredzeca amrilato. La imago de patro troviĝas en la filmo sed ne la patro mem kaj tio restos tiel ĝis la fino de la filmo. Ankaŭ la patrino ne vidiĝas, sed ni komprenas, ke ŝi venis por kontroli la infanojn tamen ni nur vidas ŝian ombron kaj la fermon de la pordo de la ĉambro. Kaj tio okazas nur por unufoje. Ni pli poste, de la patra alvoko en la interna mondo de Voula, ni komprenas kia karaktero estas sia patrino. Ĉi tiuj du gefratoj fakte serĉas amon. Ili daŭrigas ilian kaŝan vivon inter la batoj de la nekompatema mondo. Mortonta blanka ĉevalo, kiun oni alportas pere de malgranda traktoro



kaj forlasas ĝin en la mezo de la strato, kaj Alexandros, kiu ploregas super la kapo de la ĉevalo, same al Nietzsche; en la sama momento novedzino, kiu forlasas la geedziĝan halon, kaj la novedzo, kiu persvadas kaj kondukas ŝin reen. Poste la morto de la ĉevalo – sceno, kiun la kamerao ne montras al ni – kaj la invititoj en la geedzeca ceremonio, kiuj forlasas la halon en gaja mieno. Dueco de vivo kaj morto, malgajeco kaj gajeco. La dua doloro estas la kamionŝoforo, kiu akceptas la geknaboj en sia kamiono sed poste seksperfortas Voula’n. Ankaŭ tion ne montras al ni Angelopoulos. Sed tamen li tiel simple rakontas ĉion ĉi al ni. La ŝoforo perforte trenas la knabinon en la malantaŭo de la kamiono, kaj ni rigardas al la kamiono dum iom da tempo. Poste la ŝoforo eliras kaj foriras. Kaj pli poste Voula eliras el la malantaŭo rigardanta longe al la sango en sia mano. Ĉi tiu malbona, ĉi tiu naŭza afero kun la kamerao de Angelopoulos estas rakontata en tre simpla kaj doloriga maniero. Mi certe ŝatus mencii Giorgos Arvanitis, la kameraisto, kiu majstrece kaptis ĉiujn ĉi scenojn pere de sia kamerao. En siaj vivoj la plej feliĉa koincido estas la hazarda renkontiĝo kun la vojaĝanta aktoro Orestes. Li estas la unua amo de Voula, sed platona amo. Ĉar en sceno en drinkejo ni komprenas, ke li estas samseksemulo. Jen la dua bato al la knabino. La vojaĝo daŭrigos. Ili adiaŭas unu la alian. Post tiom da doloroj ili direktas sin al arbo en nebula atmosfero. La gefratoj brakumas la “arbon de vivo” kaj la filmo finiĝas. Estas neniuj problemoj malkovrigi la finon de filmo de Angelopoulos ĉar liaj filmoj ne baziĝas sur kutimaj ŝablonoj, nek sur “scivolemo provokanta” fikcioj. Longaj planoj proksimaj al reala tempo, teatraj scenoj, kombinaĵo de realeco kaj nerealeco, rivero, maro, migrantoj, malgajnintoj, ĉiuj estas rakontataj pere de lia eksterkutima stilo.

Ŝajne estas io, kion la kritikistoj pri la filmo ‘Pejzaĝo en nebulo’ ne tuŝas. Estas tri generacioj en la filmo: trupo da artistoj kiuj vojaĝas por prezenti siajn ludojn kun siaj kostumoj, kiuj jam malaperis ene de la

>>31

Ĉu oni povas akiri kaj havi kvindek filinojn aŭ kvindek filojn eĉ preskaŭ samaĝajn inter si? Oni ne hastu respondi nee, ĉar mi estas preta rakonti la interesan historion de kvindek fratinoj, filinoj de la sama patro. Tamen, mi intencas atingi ilin etraŝe, ĉar mi devas unue paroli iom pri Argolando (Αργολίς), kaj tiu Argolando estas regiono de Helenujo, okupanta la nordorientan parton de Peloponezo (Πελοπόννησος).



Tiu parto de Helenujo estas unu el la plej antikvaj kaj signifaj centroj de la unuatampaj mitoj kaj de la primitiva adorado kaj kulto al la praaj kaj pli postaj difortoj. En tiu regiono de Helenujo estis eltrovitaj certaj pruvoj de sinsekvaj enloĝiĝoj okazintaj dum la prahistoriaj tempoj, afero kiu eksplikas kial la regiono estis evoluinta en la epoko, kiam ankoraŭ ne estis aperintaj la postaj grandaj helenaj fortoj, Ateno (Αθήνα), Sparto (Σπάρτη), k.c.

En tiuj, do, tre antikvaj tempoj, Argolandon, kiu ne estis ankoraŭ evoluinta, dominis la plej granda diino, Hera (Ηρα), la fiera edzino de la reĝo de la dioj, de Zeŭso (Ζεὺς). En la sanktejo de Hera pastrino estis treege bela junulino nomata loa (Λώ), la filino de la loka reĝo Inaĥo (Ἰναχός). Kiel tre ofte okazis, la beleco de la pastrino ne restis longe nerimarkita de la senmodere amorema Zeŭso, kiu, uzante siajn kutimajn artifikaĵojn, iluziis kaj tiris la virinon al sia lito. La ĵaluza Hera, kiel ordinare, direktis sian koleron sur la malfeliĉan junulinon, kaj Zeŭso, dezirante ŝirmi ŝin de la venĝo de la diino, transformis ŝin en bovinon. Tio ne savis loan, kiu spertis longan aventur-plenan persekutadon, kies priskribo postulas apartan rakontadon. Ĉi tie, ni diru nur tion, ke loa finfine atingis la landon, kiu pli poste estis nomita Egiptujo.

Tie, loa reakiris sian homan formon, ŝi naskis sian filon Epaŝon (Ἐπαφός) kaj edziniĝis kun la reĝo de la lando Telegono (Τηλέγονος). La reĝa paro ne akiris gefilojn, do, post la morto de Telegono, Epafo sekvis lin, transpreninte la reĝecon. Post jaroj, alia reĝo, nepo de tiu Epafo, nomata Belo (Βήλος) akiris ĝemelajn filojn, al kiuj estis donitaj la nomoj Egipto

(Αίγυπτος) kaj Danao (Δαναός). Tute male ol kiel ordinare okazas, tiuj ĝemeloj, ekde la infana aĝo, estis inter si kontraŭuloj, ofte ili estis veraj malamikoj. Ilia patro, kiu ĝustatempe rimarkis tion, kiam liaj filoj viriĝis, dividis sian senliman reĝlandon, li donis al Danao la okcidentan parton, Libion, kaj al Egipto la orientan, Arabion. Malgraŭ tio, ke la du fratoj ne plu havis iajn



ajn komunajn interesojn, celojn, profitojn aŭ problemojn, neniam ili interpacigiĝis, ĉiam estis inter ili minacoj, postuloj, konfliktoj, daŭra, senfina kontraŭeco. Estas vere, ke Egipto estis ĉiam la pli ambicia, atakema kaj spitema, nenio sufiĉis al li, li deziris havi ĉion. Kaj, jen, ĉi-punkte ni revenas en la komenco de la

rakontado, pri tiuj kvindek fratinoj. Mi notu, ke krom la tiom multaj diferencoj, la du fratoj havis cefan similecon, ambaŭ estis eksterordinare generemaj, eksterordinare fekundaj. Tion atestas la fakto, ke ili akiris po kvindek infanojn. Tamen, ankaŭ je tio estas inter la fratoj precipa diferenco, ĉar Egipto akiris kvindek filojn, sed Danao kvindek filinojn! Estas kompreneble, ke la abundo da gefiloj elvenis el multaj patrinoj, tamen ankaŭ tio ne eksplikas la neimageblan fekundecon de la du fratoj, tamen ni lasu tion, estas ja vere ke tio ja okazis, estas fakto nekontestbla.

Egipto estis ĉiam atakema kaj militema, do, post nelonge li sukcesis pligrandigi sian suverenecon, konkerinte siajn najbarajn teritoriojn, el kiuj li formis Egiptujon, sian grandan kaj potencon reĝlandon, al kiu li donis sian propran nomon. Tamen, la avideco de Egipto estis nesatigebla, do, li daŭrigis, en ĉiu okazo, ĝeni kaj minaci sian fraton kaj por meti ĉion sub sia propra povo, kiam liaj filoj viriĝis, li postulis de Danao, ke li edzinigu siajn filinojn kun liaj filoj. Danao, kiu bone sciis kiom granda estas la forto de lia frato, komprenis, ke li ne povus longe rezisti, do, li decidis foriri de sia lando. Kaŝe li komencis konstrui ŝipojn kaj tiam estis por la unua fojo konstruitaj triremoj kun kvindek remiloj. Kiam ĉio estis preta, Danao kun siaj kvindek filinoj, kun siaj proksimuloj, kunuloj kaj sia havaĵo ekiris, celante atingi la landon de sia deveno, la patrujon de sia praulino loa. Kaj, jen, ni atingas denove Argolandon, pri kiu ni jam parolis en la komenco de la rakontado.

Kiam Danao kaj la Danaidinoj atingis sian malnovan patrujon, la lando estis ankoraŭ en stato



preskaŭ kruda, nekulturita. La homoj ne posedis ankoraŭ organizitajn urbetojn, vilaĝojn, apartajn loĝejojn, ili ne posedis ĉirkaŭmuregon aŭ aliajn fortikaĵojn, la terkulturado estis primitiva, la homoj estis malriĉaj kaj

senprotektaj. Malgraŭ tio, kiam Danao kaj ties sekvantoj elŝipiĝis kaj piedtuŝis la teron, trovis antaŭ si la reganton de la lando Gelanoron (Γελάνωρ) kun granda amaso da armitoj kaj scivolaj popolanoj. Danao sin prezentis kiel posteulon de loa, la forpelita reĝidino de Argolando, kaj postulis, ke oni liveru al li la reĝan sceptron kaj la regadon de la lando. La prezentitaj pruvoj estis konvinkaj, tamen la proksimuloj de Gelanoro kaj parto de la popolo dubis, kontraŭstaris kaj tiele eksplodis longa disputado, kiun rompis subita, surpriza okazintaĵo. Sufiĉe proksime al la interdisputantaj kontraŭuloj paŝtiĝis aro da bovinoj kaj unu grand-korpa taŭro. Subite, antaŭ la brutoj aperis granda lupo, kiu provis ataki ilin. La taŭro tuj kontraŭstaris al la sovaĝa besto kaj sekvis terura, longedaŭra batalo, dum kiu la lupo mortigis kaj diskarnigis la taŭron. La ĉeestantaj kontraŭuloj unuanime akceptis, ke tio estas disendita signoj, kiu montras, ke la nov-veninta Danao rajtas iĝi suvereno de la lando.

Danao, kredante ke tiu signoj estis sendita de Apolono (Απόλλων) iom pli poste omaĝis al la dio konstruante imponan sanktejon dediĉitan al ties adorado. Kaj tiele Danao iĝis reĝo de tre granda lando, sed ĝi devis multon fari por ĝin organizi. Unue li helpis kaj gvidis la loĝantojn, konstrui vilaĝojn, en lokoj kiel eble plej taŭgaj, li planis vojojn kaj ceterajn instalaĵojn kaj tute ŝanĝis, plibonigis, plifaciligis la vivkondiĉojn de la regnantoj. Plej signifa kaj malfacila devo de Danao estis la instruado de la ĝusta, kiel eble plej rezultodona terkulturado. Sufiĉe frue, tute efike li faris ĉion necesan ankaŭ en tiu kampo, tamen li alfrontadis grandan problemon, ĉar la lando ne posedis sufiĉajn akvojn ĝi estis arida, senakva, do, plejparte seka kaj malfekunda. Danao riskis perdi ĉion, li nepre devis eltrovi akvofontojn kaj tiun taskon li komisiis al siaj filinoj. La kvindek Danaidinoj disiĝis en diversajn direktojn de la lando, ili vagadis en la kampoj, la valoj, la arbaroj, la krutaĵoj, ĉie. Unu el la fratinoj, la plej bela el ĉiuj, nomata Amimona

(Αμμώνη), plenumante sian malfacilan taskon, esploradis foran montan regionon kaj por iom ripozi, li kuŝiĝis ĉe veprejo kaj post nelonge endormiĝis. De tiu loko, hazarde pasis ebria satiruso, kiu ekvidinte la dormantan belulinon, ekdeziris koiti kun ŝi, do, li sin ĵetis sur ŝin kaj klopodadis ŝin seks-perforti. La junulino ĉiaforte rezistadis laŭte kriante, tamen ŝia lukto ŝajnis senespera, kiam la granda dio Pozidono (Ποσειδών), dominanto de la regiono, aŭdis la terurajn kriojn de la virino. Subite, la granda dio, en sia tuta majesteco kaj beleco, aperis antaŭ la kunplektiĝintaj korpoj kaj per nur unu movo li svingis malproksimen la insolentan satiruson kaj liberigis la junulinon. Amimona, ankoraŭ en stato de akra konfuzo kaj timo, sin ĵetis en la brakumon de la dio kaj nestis tie tremante. La dio premis en sia brakumo la duonnudan korpon de la bela virino, klopodante ŝin trankviligi li iom karesis, iom kisis ŝin, do, post nelonge, li deziris pli multon. Tiun fojon, la amorveka Amimona ne rezistis, ne kriis, tute kontraŭe ŝi ĝuis la diajn voluptaĵojn. Kiam la gekuŝintoj reakiris sian konscion, Amimona eksplikis al la dio kia estas la kialo de ŝia vagado en dezertaj kaj danĝeraj lokoj. Tiam, la majesta dio, kontentigante la deziron de la aminda junulino, levis sian grandegan tridenton kaj forte ĝin ĵetis sur rokan ebenajon. Tuj el la masiva ter-krusto eke elfluis tri abundakvaj fontoj. Tiu estis la dia, plej malavara, plej kara rekompenco al la bela Amimona kaj al ties lando. La riĉaj fontoj tuj formis rojoj, fluejojn, riverojn, la tuta lando de sterila baldaŭ iĝis fekunda, grand-kvante produktanta. Nun, Danao havis ĉion, tamen, malgraŭ ke li estis konstruinta akropolon, li ne posedis ankoraŭ fidindan armeon kaj sufiĉan armilaron.

Ŝajnas, ke de malproksime, la nekontentigebla kaj nesatigebla Egipto, observadis la progreson kaj atingojn de lia frato kaj ĉu pro timo, ĉu pro envio, li deziris definitive malfortigi la ne sufiĉe ŝirmitan Danaon. Tiel, unu matenon, fremdaj ŝipoj alvenis kaj albordiĝis al la centra haveno. Elŝipiĝis la kvindek filoj de Egipto, kiuj, rekte, arogante, postulis de Danao, ke li edzinigu siajn filinojn kun ili. Ili minacis, ke en okazo de rifuzo ili tute detruos la landon. Danao konsciis, ke li ne havas eliron, ke li devas montri, ke li fleksiĝas, ke li estas preta rezigni sian sendependecon. Do, li cedis, li akceptis la minacan proponon kaj tuj komencis organizi la grandan, kolektivan, geedziĝon. Per lotado estis difinitaj la geedzaj paroj kaj en granda, solena ceremonio, okazis la brila grupa nupto. Oni ja diradis, ke en tiu granda edziĝofesto por la unua fojo estis ĉantita la himeno, la kanto dediĉita al Himeno (Υμέναιος), la sekvanto de Afrodita (Αφροδίτη) kaj dio de la nuptofestoj. Ĉio ŝajnis normala, tamen ĉiuj

Danaidinoj, en konsento kun sia patro kaj provizitaj de li per taŭga ponardo, la nokton, kiam ili retiriĝis en la geedza dormoĉambro, surprizis kaj mortigis siajn edzojn sur la geedza lito. Nur unu el la Danaidinoj, Hipermnestra (Υπερμνήστρα), ĉu ĉar la edzo estis tre bela, ĉu ĉar ŝi ekamis lin, ĉu ĉar ŝi estis molkora, ne mortigis sian edzon, Ligeon (Λυγκεύς) kaj tio vekis la koleron de ŝia patro, kiu unue enkarcerigis kaj poste kondukis ŝin al la juĝejo. Tie, tamen, post verŝajna interveno de Afrodita, Hipermnestra estis absolvita kaj ŝi daŭrigis vivi feliĉe ĉe la flanko de sia bonsorta edzo.

La Danaidinoj estis ja kulpaj je grava krimo, tamen tiu krimo estis la sola solvo, la sola vojo al la definitiva deliberiĝo de la gento de Danao, ĉar Egipto sen siaj filoj ne plu estis danĝera. Estas pro tio, ke, kiel la pastroj diris, post ordono de Zeŭso mem, Hermeso (Ερμής) kaj Atena (Αθηνά), la du grandaj olimpaj dioj, purigis kaj senkulpigis la junulinojn. Post ĉio tio ĉi Danao organizis la unuajn en la mondo atletajn konkursojn, kiujn partoprenis ĉiuj edziĝopovaj junuloj de la lando. La kvardek naŭ unuaj venkintoj ricevis kiel premion po unu el la Danaidinoj kaj tiele naskiĝis la glora gento de Danao. Argolando iĝis la plej riĉa kaj plej potenca helena teritorio de tiu fora epoko, tiel, ke la Helenoj estis nomataj de la poetoj ankaŭ Danaoj (Δαναοί). Notinde, ke tiu Ligeo, la sola ne mortigita filo de Egipto, sekvis Danaon en la reĝeco de la lando kaj efike kontribuis al ties plua progreso.

En tiu ĉi punkto mi devus noti la finon de la rakontado, tamen mi devas aldoni ankoraŭ jenon:

Ŝajnas, ke kelkajn fojojn la koncepto de la homoj pri kelkaj aferoj estas kontraŭa al tiu de la dioj. Do, ŝajnas, ke multajn jarcentojn pli poste, la senkulpigo de la Danaidinoj ne estis facilanime aprobata kaj akceptita de la homoj, do, iom-post-iome naskiĝis versio de la mito, laŭ kiu la Danaidinoj vivis feliĉe, tamen post ilia morto, en Hadeso (Αδης) ili estis tre severe punitaj, ili estas por eterne kondamnitaj al senfina plenigado de senfunda ĵaro, la mond-konata "ĵaro de la Danaidinoj" (πίθος των Δαναϊδων).

La pli multaj verkistoj kaj ĉiaspecaj artistoj plej ofte prezentas ilin en tiu ilia stato, de la kondamnitoj, tamen, mi ne povas tion akcepti, ĉar mi pensas, ke krimo pardonita de Zeŭso, ne povas tiri ian ajn postmortan punon!

Tamen, tio kio estis unuanime akceptita estas la arda amo kaj pasio de Zeŭso al la bela loa. Tial, la homoj metis ŝin sur la ĉielo kaj nun kaj por eterne ŝi estas stelo (lo), eĉ la unua satelito de Jupitero (Zeŭso), de la iama plej granda dio kaj al la nuntempa plej granda planedo!



-- el GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO

verkis **Spiros Sarafian** el Grekio
(elekto, aranĝo de bildoj, de Kostas Kiriakos)

Kia estis... (Milyen volt...)

Kia estis ŝia blondeco, mi ne scias jam,
Sed scias, ke la kampoj estas blondaj,
Se kun abunda spikaro venas la flaviĝanta somero,
Kaj en ĉi tiu blondeco mi denove sentas ŝin.

Kia estis la blueco de ŝiaj okuloj, mi ne scias jam,
Sed kiam malfermiĝas aŭtune la ĉielo,
En la septembra laca adiaŭo
Mi rememoras la koloron de ŝiaj okuloj.

Nek kia estis la silko de ŝia voĉo mi scias jam,
Sed se je printempigo ĝemetas la herbokampo,
Ŝajnas al mi, ke la varma voĉo de Anna trasonas
El printempo malproksima, kiel la ĉielo.


-- poemo de **Gyula Juhász** (1883-1937) el
Hungario

tradukis kaj sendis **Lenke Szász** el
Rumanio



Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (parto 4)

(daŭrigata)



Artikolo 24

Ĉiu havas rajton je ripozo kaj libertempo, inkluzive racion limigon de la laborhoroj kaj periodajn feriojn kun salajro.



Artikolo 25

1. Ĉiu havas rajton je vivnivelo adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio, inkluzive de nutraĵo, vestaĵoj, loĝejo kaj medicina prizorgo kaj necesaj sociaj servoj, kaj la rajton je sekureco en okazo de senlaboreco, malsano, malkapablo, vidvineco, maljuneco aŭ alia perdo de la vivrimedoj pro cirkonstancoj ekster sia povo.

2. Patrineco kaj infaneco rajtigas al specialaj prizorgoj kaj helpo. Ĉiuj infanoj, egale ĉu ili naskiĝis en aŭ ekster geedzeco, ricevu saman socian protekton.




Artikolo 26

1. Ĉiu havas rajton je edukiĝo. La edukado estu senpaga, almenaŭ en la elementa kaj fundamenta stadioj. La elementa edukado estu deviga. La teknika kaj porprofesia edukado estu ĝenerale akirebla, kaj pli alta edukado estu egale akirebla por ĉiuj laŭ ties meritoj.

2. Edukado celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasaj aŭ religiaj grupoj, kaj antaŭenigu la agadon de Unuiĝintaj Nacioj por konservo de paco.

3. Gepatroj havas unuavican rajton elekti la specon de la edukado, kiun ricevu iliaj infanoj.




Artikolo 27

1. Ĉiu rajtas libere partopreni la kulturalan vivon de la komunumo, ĝui la artojn kaj partopreni sciancan progreson kaj ĝiajn fruktojn.

2. Ĉiu havas rajton je protekto de la moralaj kaj

materialaj interesoj rezultantaj el eventualaj sciencaj, literaturaj aŭ artaj produktaĵoj, kiujn li aŭtoris.



Artikolo 28

Ĉiu havas rajton je socia kaj internacia organizo, en kiu la rajtoj kaj liberecoj difinitaj en ĉi tiu Deklaracio povas esti plene realigitaj.



Artikolo 29

1. Ĉiu havas devojn al la komunumo, en kiu, sole, estas ebla la libera kaj plena disvolviĝo de lia personeco.

2. En la uzado de siaj rajtoj kaj liberecoj, ĉiu estu subigita sole al tiuj limigoj, kiuj estas jure difinitaj ekskluzive kun la celo certigi adekvatan rekonon kaj respekton por la rajtoj kaj liberecoj de aliaj kaj por konformiĝi al justaj postuloj de moralo, publika ordo kaj ĝenerala bonfarto en demokrata socio.

3. Tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas en neniu okazo efektivegeblaj kontraŭe al la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.



Artikolo 30

Nenio en ĉi tiu Deklaracio estu interpretita kiel implico, ke iu ajn Ŝtato, grupo aŭ persono iel ajn rajtas entrepreni ian ajn agadon aŭ plenumi ian ajn agon, kiu celus detrui kiun ajn el la rajtoj kaj liberecoj ĉi-ene difinitaj.

Fonto: https://udhr.audio/UDHR_Video.asp?Ing=epo&p=Cover

Ankaŭ aŭskultebla pere de voĉlegado de Aaron (Arono) Chapman

(fino)

Alexander Wilhelm Heinrich von Humboldt [aleksander fon humbolt] naskiĝis en 1769-9-14 en Berlino.



La patro, Alexander Georg (1720...1779) estis majoro, grandbienulo, ĉambelano de prusa kortego; la patrino, Elisabeth (1741...1796), estis antaŭ la geedziĝa festo vidvino kaj havis el sia unua geedzeco filon: Heinrich Friedrich Ludwig Ferdinand von

Holwede (1763...1817). Ŝia dua filo kaj la unua filo de Georg Alexander estis Wilhelm (1767...1835).

Privataj instruistoj instruis la tri filojn hejme en sia kastelo lingvojn (germanan, grekan, latinan, francan, hispanan), historion, natursciencojn. Wilhelm kaj Alexander studis financan aferojn kaj administradon en Frankfurt al Odoro ekde 1787. Tie Alexander amis teologian studenton. Jam ekde 1788 Alexander lernis en Berlino private ĉe sciencistoj teknologiojn, fizikon, matematikon, desegnadon, botanikon, mineralogion.

En 1789 Alexander studis en Göttingen natursciencojn kaj lingvojn. Intertempe li vojaĝis ofte tra Germanio kaj observis plantojn, bestojn, elektis ŝtonojn. Li ekkonis la mediciniston kaj revoluciulon Georg Forster (1754...1794) kaj ekskursis kun li tra Germanio, Flandrio, Nederlando, Anglio, Francio. Alexander verkis libron pri bazaltoj al Rejno. En 1790 post la ekskurso li transloĝis al Hamburg kaj studis en komerca akademio; krome li lernis la anglan, danan, svedan lingvojn.

En 1791 li translokiĝis al urbo Freiberg en Saksonio kaj studis mineralogion, geologion, minekspluatadon, ĥemion, desegnadon, fiziologion de plantoj. Ofte li observis naturon, ekskursis tra Saksonio kaj Bohemio kaj verkis artikolojn kaj libron pri plantoj vivantaj sub tero. Dum 8 monatoj li finis studadon, kiu por aliuloj bezonus tri jarojn. Li reveturis al Berlino kaj estiĝis montasesoro en prusa ŝtata servo.

La prusa reĝo Friedrich Wilhelm II. kaj ministroj laŭdis lin. Liaj informoj ebligis aŭ plibonigis la ekspluatadon de mineraloj. Li eltrovis magnetan monton: Haidberg ĉe Zell en Bavario. Li plibonigis kondiĉojn laborajn, konstruis certecan lumilon por ministroj, fondis profesian lernejon por ministroj, kiu li pagis sam, (tio estis la unua profesia lernejo en

Germanio ajn), verkis lernolibrojn.

Kiam li eksciis pri observadoj de Luigi Galvani pri influo de kurento je muskuloj (ili kontraĥiĝas per elektra fluado), li supozis, ke kurento estus viva potenco. Ankaŭ al sia korpo li eksperimentis per kurento kaj acidoj. Poste li publikigis libron pri tio.

Ĉar lia frato Wilhelm kun sia familio loĝis en Jena (Turingio), Alexander ekkonis Goethe (1749...1832), verkiston, poeton kaj natursploranton. Alexander kaj Johann Wolfgang von Goethe kunlaboris pasie. Goethe estis entuziasmigita de Alexander kaj eternigis Aleksandron en sia dramego "Faŭsto" kiel senlaca esploristo, kiu volas scii, kio tenas kune mondon interne. Samtempe Alexander ekkonis la amikon de Goethe, la verkiston kaj poeton Friedrich Schiller (1759...1805). Schiller instigis Aleksandron verki rakonton por la revuo "Horen". Alexander verkis sian unikan beletraĵon "La viva potenco aŭ la Rodosa genio", rakonton, en kiu li esprimas metafore sian malkontentecon pri limigado de germana seksa moralo.

Kiam en 1796 la patrino de Humboldt mortis, Alexander kaj Wilhelm ne partoprenis entombigadon, ĉar ŝi estis senama. Alexander ĝojis pro heredajoj: Ekde tiam li estis tute libera kaj eblis maldungi kaj vojaĝi.

Li preparis zorge sian esploran vojaĝegon aĉetante 50 sciencajn ilojn: mapojn, kompason, termometrojn, ilon por difino de loko, ilon por mezurado de devio de kompasoj, mezuri magnetpotencon, aeran elastecon, elektran potencon, mensuri kvoton de okcigeno kaj karbona dioksido en aero, sekstanton, teleskopon, ilon por difini koncentritecon de likvaĵoj, mezuri pluvkvanton, difinon pozicion de steloj, barometron, taksilon de akvoenhavo de aero per komparo de blugrado de ĉielo k.a.

Hazarde en Pariza hotelo Alexander ekkonis mediciniston, botanikiston Aimé Bonpland (1773...1856). Ambaŭ ekskursis al Marseille en Francio pro plantoj en 1798 kaj poste al Hispanio. Pere de hispana ambasada sekretario (konatulo de Alexander) la hispana reĝo Karlo IV. donis al Alexander permesilon por vizitado de hispanaj kolonioj amerikanaj.

En 1799-6-5 Humboldt kaj Bonpland ekvojaĝis al kanariaj insuloj kaj Sudameriko: Venezuelio, Kubo, Kolombio, Peruo, Meksikio, Ekvadoro. Ili kolektis 60.000 plantajn specojn (inter ili 6.300 nekonataj), datumojn magnetajn, meteorologiajn, klimatologiajn, oceanajn, geologiajn, zoologiajn. Ili vizitis minojn,

salejojn, observis funkcion inter aera temperaturo kaj alteco, observis regionon de eterna neĝo, okupiĝis pri socialaj, komercaj, politikaj faktoj, per historio kaj lingvoj de indianoj, subtenis la projekton de kanalo inter Kariba maro kaj Pacifiko.

En 1800-2...5 ili esploris la venezuelan riveron Casiquiare: ĝi ligas 2 riverojn (Orinoco kaj Guainia, fonta rivero de Rio Negro); tio estas rara kazo de disforkiĝo. Sur Orinoco Humboldt falis el boato en akvon sed ne povis naĝi; Bonpland savis lin. Ili grimpis montojn, eĉ vulkanojn kaj eĉ Ĉimborazon en Ekvadoro ĝis 6.270 m per maltaŭgaj vestaĵoj. Ili estis atestantoj de tertremo.

En 1804 ili estis en Havano kaj Alexander verkis eseon pri Kubo; ĝi temas pri politiko, ekonomio, konstitucio, historio, homaj rasoj kaj sklaveco kiel malbonego. Alexander kondamnadis skribe kaj buŝe sklavecon laŭ principoj de Franca revolucio (egaleco, libereco, frateco) estos pli malfrue kaŭzo, ke la brita Orient-hinda kompanio malpermesos al li viziti iun britan kolonion.

La lasta vojaĝo en Ameriko estis al Vaŝingtono en Usono. La prezidento Jeffersen ricevis Aleksandron kaj aŭdis kun simpatio lian raporton.

En 1804-7-9 Bonpland kaj Humboldt revojaĝis al Francio. 1/3 da monhavaĵo de Humboldt estis uzita.

En Parizo Humboldt esploris kun la fizikisto kaj ĥemiisto Joseph Louis Gay-Lussac kaj kun la fizikisto kaj astronomo Dominique François Jean Aragon polarizadon de ĉiela lumo, lumvastigadon en fluantaj likvoj kaj kristaloj, turnigon de polariza ebena en kvarco. Humboldt kaj Gay-Lussac analizis aeron, esploris geomagnetismon sub diversaj latitudoj. Humboldt prelegis en Nacia instituto. Li estis prezentita al Napoléon Bonaparte; sed Napoléon salutis lin malvarme, opiniis lin spiono. Samtempe Alexander ekkonis en Parizo batalanton por libereco de Sudameriko, Simon Bolivar.

En 1805 Humboldt publikigis sian verkon "Eseo pri la geografio de plantoj".

Li translokiĝis malvolonte al Berlino reakcia, ĉar la prusa reĝo Friedrich Wilhelm III.

postulis lin kiel ĉambelano (2500 taleroj po jaro). En tiu tempo li publikigis planotan 34-voluman verkon pri la "Vojaĝo al regionoj ekvatoraj de nova kontinento". Per tio li fondis plantan kaj politikan geografion.

En 1806 estis milito inter Prusio kaj Francio; francoj okupigis Berlinon; la prusa reĝo fuĝis al Orientprusio. Dum packonferenco la prusa registaro petis Humboldt partopreni.

En 1809 Alexander rifuzis oferton estiĝi ministro pri kulturo. Ofte li akompanis la reĝon prusan dum

vojaĝoj eksterlande. En 1810-5-30 fondis Wilhelm von Humboldt en Berlino universitaton laŭ reĝa decido.

Ĉar Alexander volis vojaĝi al Persio kaj Hindio, li lernis la persan kaj araban lingvojn.

Malgraŭ milito inter Francio kontraŭ Prusio kaj Rusio Alexander laboris en Francio kaj ekamikiĝis kun François Aragon (1786...1853), fizikisto kaj aventuristo. direktoro de Pariza stelobservejo.

En 1814 Alexander instigis publikigi "Atlason de nova kontinento" (Sudameriko) en Francio. Plurfoje Alexander vojaĝis al Londono, unfoje eĉ kun prusa reĝo (Friedrich Wilhelm III.).

Humboldt publikigis en 1817 la libron "Pri izotermoj kaj disvastigo de varmeco sur globo" fondigante klimatologion.

Li deziris vojaĝi al Hindio, sed Orienthinda komerca kompanio rifuzis: ĝi timis lian kritikadon pri sociaj rilatoj.

Simon Bolivar -- laŭ li havas Bolivio sian nomon -- diris: " Humboldt efikis por Ameriko plur da bonaĵo kiel ĉiuj konkerintoj." Pro dankemo Meksikio oferis sian ŝtatanecon al Humboldt en la jaro 1827.

En Berlina akademio de sciencoj Alexander prelegis pri temperaturdiferencoj sur la globo. Inter 1827 kaj 1828 li prelegadis en Berlina universitato sub titolo "Kosmo" pri naturo kaj socio sukcesege: Lin aŭdadis homoj de ĉiaj klasoj (eĉ la reĝo). Pro treega intereso li planis libron kun tiu-ĉi titolo. En ĝi li pritraktis la kosmon, la teron, historion de ŝtonoj, vivestaĵon, lingvojn, historion de ekkonado de mondo, kulturon de popoloj. Inter 1845 kaj 1862 estis publikitaj 5 volumoj. Pere de tiu-ĉi verko li instigis prosperon de natursciencoj (1834....1862).

Alexander konsilis ankaŭ rusan financministron, ĉu eblus platenaj moneroj. Tial la caro Nikolaj invitis Humboldt viziti Ruslandon. Inter majo kaj novembro de 1829 li vojaĝis al Peterburgo, Moskvo, Uralo ĝis Sibirio, sume 15.000 km.

En 1831 kaj 1832 li verkis en Parizo la libron "Fragmentoj de geologio kaj klimatologio de Azio".

En 1836 li publikigis raportojn pri siaj vojaĝoj: historio, botaniko, astronomio, planta geografio. La kostoj por printado konsumis lian monhavaĵon.

Inter 1840 kaj 1854 li influis prusan ŝtatan konsilion, efiki leĝon kontraŭ sklaveco kaj toleri gejudojn. En 1848-3 estis revolucio en germanaj provincoj. La nova reĝo Friedrich Wilhelm IV. kaj ministroj parolis en Berlino al popolo de-el kastela balkono; sed la manifestantoj postulis, ke Alexander von Humboldt parolu; sed li nur paŝis sur balkonon, klinante sin, ne parolante. Unu tago poste Alexander aliĝis al funebraj manifestantoj, kiuj portis mortiĝintajn revoluciulojn al tombejo. Aliflanke en 1854 la reĝo

inaŭguris memoraĵan kolonon honore al soldatoj, mortintaj dum revolucio en 1848; Alexander ĉeestis honorante ilin.

En februaro 1857 Alexander suferis apopleksion. La 6-an de majo 1859 Alexander von Humboldt mortis en Berlino. La tombo estas en ĝardeno de kastelo Tegel (norda Berlino).

Ĉar li havis ŝuldojn kaj ne povis salajri sian serviston, li heredigis ĉion al sia servisto. La servisto vendis 11.000 librojn al Londona librovendisto; nur 500 el ili travivis fajron.

verkis kaj sendis **Ulrich Wilke** el Germanio

Astrologio kontraŭ Psikologio

Astrologio, senkonsidere de la problemo de ĝia eventuala vereco aŭ klarigado - pri kio mi vidas pravigeblan ! - se nur konsidere la rezultojn la prikarakteraj studoj kaj uzoj entenas, male je Psiĥologio humanismon propran.

Jes ja, dum psikologio ediktas normojn, paradigmojn, ordigas homojn kaj sentojn en sanaj kaj patologiaj, normalaj kaj problemaj, prezentas ununuran skemon kaj klarigon de la homa psiko (Estas io faŝisma, kaj io sekteca en ĝi, ekter ties (nunaj..., furoraj, ricevitaj, devigaj) juĝoj kaj interpretoskemoj nenia savo !), astrologio ne prezentas unuforman skemon da homa psiko, nek

unu formo de estado, male fundamente ĝi estas, ne normigo pere de sciencaj ideologioj, sed priskribo, konstato kaj ordigo en unue dekdu (poste astrologie kaj individue variigeblaj) tipoj.

Tiel ĝi interalie montras ke plej diversaj mensoemoj povas esti iel virtoj, laŭ la maniero vivi ilin, kaj aliaj povas kaŭzi problemojn en tia aŭ tia kunteksto, ne eĉ tiam ĝi ne pretendas "kuraci" la homojn, ĉar fundamente ili diras, kaj do scias, ke oni ne povas ŝangi sian naturon, nur praktikajn












verkis kaj sendis Roland Platteau, el Francio

konsilojn oni povas doni pri kio estas bona por iu certa tipo de homo, ktp, kaj fatke do ĝenerale la konsiloj estas direktitaj ne al la priskribitoj (kiel mi diris oni ne ŝanĝas) sed al iliaj kunuloj pri kiel bonas konduiti kontraŭ tiu aŭ tiu, kion eviti, ktp.



Kun Psikologio homaro iĝas fabrikejo de similaj partoj kies muntoregulado ĝi donas; kun Astrologio homaro iĝas iridiĝanta ĉielarko, vasta ĝardeno.

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

<p>Capricorn</p>  <p>22 Dec - 20 Jan</p>	<p>Aquarius</p>  <p>21 Jan - 19 Feb</p>	<p>Pisces</p>  <p>20 Feb - 20 Mar</p>	<p>Aries</p>  <p>21 Mar - 19 Apr</p>
<p>Taurus</p>  <p>20 Apr - 20 May</p>	<p>Gemini</p>  <p>21 May - 21 Jun</p>	<p>Cancer</p>  <p>22 Jun - 23 Jul</p>	<p>Leo</p>  <p>24 Jul - 23 Aug</p>
<p>Virgo</p>  <p>24 Aug - 22 Sept</p>	<p>Libra</p>  <p>23 Sept - 22 Oct</p>	<p>Scorpio</p>  <p>23 Oct - 22 Nov</p>	<p>Sagittarius</p>  <p>23 Nov - 20 Dec</p>

Astrologio kontraŭ Psikologio - Majo / Virbovuloj



Ni do komencu pri la virbovuloj, mi persone konis unu, kaj la ja similis tiun portreton. Laŭ la [[Astrologio|astrologiistoj]] la naskiĝintoj de ĉiu zodiaka signo havas karakteron propran je tiu signo. Jen laŭ ili la personeco de la « virbovuloj »

Korpo kaj sano

Li estas ĝenerale larĝekonstruita, kun aĝo formiĝas ventro iom elstaranta, la vizaĝo havas rondajn liniojn, ronda nazo, plenkarnaj frandemaj lipoj, okulo borderita per longaj okulharoj, ankaŭ manoj estas dikaj kaj karnaj, la kolo larĝa. Li estas el tero kaj sensa, li bezonas tuŝi, palpi ; la voĉo estas kolora, muzika ; Sentiĝas en li spuron de maldelikateco.

Lia sano estas solida, li havas fortan laborpovon, sed faras ĉion kun malrapido, kaj ŝparo, sobre.

Sed li samtempe malemas sporton, kaj tio ofte evidentiĝas manko al lia sano. Li ankaŭ devus lukti kontraŭ sian emon al tro riĉe manĝi.

Tamen, se li eskapas el troa sangopremo, li povas iĝi vigla kaj solida maljunulo, la amo al vivo, kvieto memcerteco ekvilibras lin, kaj al li taŭgas respekti la ritmojn de naturo kaj vivi en la kamparo, kiu pli bone resanigas lin ol ĉiaj artaj kuraciloj.

Kiel li reagas ?

Li ŝatas belon, amas plezurojn, kaj « fakule » aprezas ilin, li ĉerpas el simplaj aferoj profundajn ĝojojn, kaj li scias eventuale kontentiĝi per la esenca, lasante la superfluan. Estado feliĉigas lin, kaj li ne sindemandas metafizikajn demandojn.

Ve al tiu, kiu malutilis al li ! aŭ al lia patro, aŭ avo: lia venĝemo neniam estingiĝos. Lia plej granda malvirto estas eble lia posedemo, li havas instinkton proprietulan: „lia“ edzino, „lia“ domo, „lia“ mono, „lia“ iniciato estas plej karaj.

Kvankam lia varmkora aspekto, li estas fakte sufiĉe sekreta, li ne fidus al la novrenkontito, li atendas de aliuloj, ke ili estu elpluvitaj. Li pripensas decidojn, sed elektinte li neniam retropaŝas; persistemo, malcedemo estas samtempe al li forto, kaj lia malforto. Li tamen havas solidan intelekton kaj kapablon al solidajn sintezoj; neniam li soras en nuboj, li restas surgrunde konkreta, prudenta, singarda.

Mono estas grava, kaj la bezono pri sekureco.

Je kio li taŭgas ?

Por negocoj plej ofte. Li havas virtojn pri organizokapablo, praktika sagaco, realosento, kaj ne lasas sin facile emocii de la problemoj de aliuloj. Li defendas la proprajn interesojn, kaj estas fojfoje riproĉita ke en li mankas malavaro.

Li ankaŭ estas lerta al libertempaj manlaboroj, li interesiĝos pri arĥitekturo aŭ urboscienca, Pro lia logo al tero li taŭgas al terkultivado, esploro pri sterkoj.

Kiel li amas ?

La virbova, amante la vivon, amas ankaŭ amon, kaj amaron. Tiu ĝuema malestimas la « fuŝulojn », kiuj ne diligente klopodas por doni al virino ĉiom la plezuron, kiun ŝi atendas. Li ludas ŝin kiel oni ludus violonĉelon ; kun fervoro efikeco, dankemo.

Dum la junaĝo li papiliumas iom, kun avido kaj scivolemeo malsatigeblaj. Kaj iam li decidas konstrui, fondi hejmon. Kaj tiuteme li malŝercas. Lia edzino, liaj infanoj, estas sankteĝaj liaokule. Li faras sian elekton kun atento, li pezas avantaĝojn kaj malavantaĝojn, poste decidiĝas. Se estas baroj, li disbatas ilin. Li ja baraktas por meriti sian feliĉon, kaj atendas ke li estos pagita interŝanĝe.

Li estas kunvivofacila, babilriĉa kuntablano, gajigulo, parolema en liaj plenfeliĉaj momentoj, kiam li estas ĉetable, ke bonas kunularo kaj vino bone fluas. Sed kiam li estas malbonhumora, aŭ paŭtas, pli bone ne provi aliri lin, atendi, kaj elpaŝi la unuan paŝon kiam li komencos malstreĉiĝi.

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio

Pripensanta Kaoson

de Maria Nazaré Laroca, el Brazilo

"La poemo, tiu stranga masko, pli vera ol la vizaĝo mem."
(Mário Quintana)

maskoj uziĝas
por elmontri
la personecon
de la uzantoj.
Hodiaŭ ankaŭ.



Maria Nazaré Laroca

Juiz de Fora, 21/04/2020, Brazilo

<http://nazarelaroca.blogspot.com/2020/04/pensando-o-caos-pripensanta-kaoson.html>

Kaj subite
ekaperas viruso
kronita per morto,
kaj provokas
renversiĝon
en la mondo
perpleksa.

Falas mask' de l' egoismo,
kaj la tuta homaro
alian maskon ekuzas
kontraŭ malamik' nevidebla,
kiu forrabis la tempon,
kaj ŝanĝis la ludregulojn.

Laŭ onidiroj,
ĉe maskobaloj



Ŝercoj



En la vendejo de konstru-materialoj aĉetanto demandas longharan vendiston:

- Ĉu vi estas ulo aŭ ino?
- Ĉu tio gravas por vi?
- Jes, ĉu la cementon portos vi aŭ mi?

Mi fariĝis nekredeble riĉa. Mi havas arĝentan hararon, juvelŝtonojn en miaj renoj, sukeron en la sango, plumbon en miaj piedoj, platenon en la koksoj, feron en la arterioj kaj kio valoras eĉ pli, neelĉerpeblan fonton de naturgaso en la intestoj. Mi havas sufiĉe da karburajo por atingi Marson. Mi eĉ ne sonĝis ke iam mi fariĝos tiel riĉa.




En nudistejo, oni prezentas al Vilhelmo belan junulinon. Li diras al ŝi: Mi tre ĝojas renkonti vin. Rigardante malsupren, ŝi respondas: Jes, mi vidas!

Krucvortenigmo



HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Glaciaĵo; 6. En ŝako, movi samtempe reĝon kaj turon; 11. Enveni, kontribui; 12. ___ montras malfeliĉo (Zamenhof); 13. Objekto cilindroforma; 14. Bonodora; 15. ___, cia, lia; 16. Eliro; 17. ___-Kluks-Klano; 18. Mallongigo de Asperger-Sindromo; 19. Sledon; 20. La cifero 0; 21. Civitanoj de Pollando; 22. Transigi objekton en alian lokon; 23. Koridoron, padon; 25. Filon de frato aŭ fratino; 26. Giganto infanmanĝanta; 27. Panvendejo.



VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. Ĝia ĉefurbo estas Berlino; 2. Malplezuris pro senintereso; 3. Hele malva; 4. Ekstera montro de ies forto; 5. Simbolo por titano je kemio; 6. Seksajn inklinojn al iu; 7. Samsoneco inter du aŭ pluraj vortoj; 8. Sepa, ___, naŭa; 9. Litero K; 10. Antidiabeta hormono; 12. Grandoj de surfaco; 14. Liturgian ĝispiedan veston el blanka tolo; 16. Dio de la ventoj

(akuzativo); 17. Grandaj nekovritaj vazoj; 19. Krio de hundo; 20. En nova maniero; 21. Prepozicio montranta instrumenton, materion aŭ objekton; 22. Kaproblek-; 24. Simbolo por rentgenio je kemio; 25. Landokodo de Namibio.

Fonto: Semajno de Enigmoj #5

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

La riĉeco de Julian Modest

Ne ĉiam oni povas distingi la talentulojn, ĉar tage ili laboras ie, kiel ĉiuj, sed post la fino de la labortago, ili ne ripozas - komencas "flugi" ien. Kiam ili estas inter ni, ili atente rigardas, aŭskultas, ridetas, ion pensas...Vespere, nokte, kiam la aliaj dormas, la animo de la talentuloj trovas siajn proprajn vojojn – ili verkas, aŭ muzikas, pentras, ion malkovras, ion elpensas... Tiuj homoj estas liberaj, anime riĉaj, feliĉaj, ofte – saĝuloj ...

Inter tiuj anime riĉaj homoj estas la bulgara verkisto Georgi Mihalkov (Julian Modest), naskita kaj loĝanta en Sofio.

De 2000 li estas ĉefredaktoro de revuo "Bulgara Esperantisto", kiu dum 2019 havis 100-an jubileon.

Ekde 2016 li estas vicprezidanto de Esperanta PEN-Centro.

Kiel bulgara verkisto li estas membro de Bulgara Verkista Asocio.

Li redaktis plurajn Esperantajn kaj bulgarajn librojn. Li ofte prelegas pri la originala Esperanto-literaturo, verkas recenzojn kaj studojn pri Esperanto-libroj, renkontiĝas kun la legantoj en nia lando kaj eksterlande.

liuj homoj havas multe da libera tempo kaj preferas amuziĝi, la aliaj, kiel li, ne perdas tempon kaj pro sia ŝatata agado estas feliĉaj.

Li komencis lerni la Internacian Lingvon Esperanton, kiel studento en Sofia Universitato. Lia


verkis kaj sendis Elena Popova el Bulgario

apero en la literaturo komenciĝis en Budapeŝto, dum 1983 kie tiam li loĝis kaj laboris. Ĝis la fino de 2019 li eldonis 21 verkojn: dramojn, eseerojn, novelarojn, romanojn, kaj dum la lastaj jaroj, li verkas krimromanojn. liuj de la libroj estas eldonitaj en bulgara, Esperanto kaj pere de Esperanto estas tradukitaj en aliajn lingvojn. Ĉiu leganto povus trovi preferatan libron kaj ĝui lian elegantan stilon... Ekzemple: "Maja pluvo", Brazilo, "Bela sonĝo" - dulingva novelaro, Esperanta kaj korea, eld. en Suda Korejo, "La enigma trezoro" – originala romano por adoleskuloj, "La viro el la pasinteco" kaj "Dancantaj kun ŝarkoj", eldonitaj en Kroatio, "Mara stelo" - Moskvo, aŭ la serio krimromanoj, eldonitaj en Belgio - "Murdo en la parko", "Serenaj matenoj", "Amo kaj malamo"...

Jen kiel la eldonisto el Belgio prezentas la libron al la legantoj: "Legante "Ĉasisto de sonĝoj" oni nerimarkeble eniras mirindan mondon, riĉan je aventuroj, emocioj, espero kaj amoj"

Iam William Auld skribis pri li: "Julian Modest estas ege sentema observanto kaj lia psikologia kompreno de la homaj sentoj kaj motivigoj estas trafa kaj profunda."

verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario



DUA PARTO - LA VIVO

69



**Ĉe la soldatoj oni diras:
„Mi ne kuraĝas agi kiel mastro,
sed prefere kiel gasto.
Mi ne kuraĝas antaŭenpaŝi eĉ unu colon,
sed prefere retiras piedon je futo.“
Tio estas iri sen gamboj,
skermi sen brakoj,
ĵeti sen ataki,
konservi sen uzi armilojn.
Ne ekzistas pli granda malfeliĉo
ol subtaksi la malamikon.
Se mi subtaksus la malamikon,
mi elmetus min al la danĝero perdi miajn
trezorojn.
Tie, kie du armeoj batalante kunpusiĝas,
venkos tiu, kiu batalas pezkore.**

Rimarkoj de Anniespera:

Vilhelmo:
„Tio estas iri sen gamboj,
skermi sen brakoj,
ĵeti sen ataki,
konservi sen uzi armilojn.“
Tiujn suprajn frazojn oni komprenas en Ĉinio kutime tiel
(citita laŭ
Wang Chongfang):
„Tio estas nomata:
Disaranĝo de neniam trupoj en batalordo,
Levo de neniam brakoj,
Alfrontado de neniam malamikoj,
Tenado de neniam armiloj.“

(daŭrigota)

Blogo de murdoplananto

-- el la blaga blogo

Kiam okazis la lasta oficiala horŝanĝo al la vintra tempo, mi ne estis hejme. Laŭleĝe, kiam batas la tria nokte, oni devas malantaŭenigi la horloĝojn unu horon, kaj la tempo, kiu pasas de la 2:00:00 ĝis la 2:59:59, okazas oficiale dufoje. Ĉar nuntempe la plejparto el la horloĝoj estas en iloj rete konektitaj, la ŝanĝo estas plejparte aŭtomata.

Tiunokte, troviĝante en hoteleto de ĉarma urbo, mi ne facile ekdormis, ĉar en la najbara ĉambro loĝis du laŭtparolemaj virinoj. Poste, mi duonvekiĝis aŭdante du batojn de la urba sonorilo. Jen la dua nokte, mi pensis. Por vanuigi iun ajn dubon, mi ankaŭ ĵetis rigardon al mia poŝtelefono: jes, la dua nokte. Tamen, pri kiu dua nokte temas? Ĉu la unua dua nokte aŭ la dua dua nokte? Tiu dubo ne permesis al mi pludormi kaj mia cerbo komencis plani perfektan murdon. Mi ofte faras tion. Tio estas, mi ofte planas perfektajn murdojn. Kompreneble, ĝis nun mi murdis neniun. Tamen, jen mia nova kreaĵo: se la kamerao de la hotela parkejo registrus mian eliron je la (dua) 2:15, antaŭe mi povus trankvile mortigi la du malafablajn kaj bruemajn najbarinojn, ĉar mi havus sufiĉe da tempo de la (unua) 2:20 ĝis, ni diru, la (unua) 2:40. Do sufiĉus, ke mi faru ion alian dum tiu tempo, sed de la (dua) dua-nokte. Plenigado de la benzinujo de mia aŭto taŭgus. Tiamaniere, kiam la detektivo analizus la alibiojn de la gastoj de la ĉarma hoteleto, mi povus



pruvi, ke mi eliris per mia aŭto antaŭ la horo de la "terura okazaĵo" kaj povus montri la atestilon de mia benzin-aĉetado samhore okazanta, kiam la ĉarmaj virinoj estis mortigitaj pere de nepreskribeblaj turmentoj.



Ĝi ŝajnas perfekta krimo, ĉu ne? Tamen estas problemo. En la teoria mondo, ĉio belas, ĉio funkcias akurate, sed la realo montriĝas senespere malperfekta: la horloĝo de la parkeja kamerao eble ne aŭtomate malantaŭeniĝus kaj dum la gardisto ne

aranĝus tion mane en la sekva mateno. La detektivoj ne estas tiom stultaj kaj tuj rimarkus, ke se mi estus pleniginta mian benzinujon antaŭ ol eliri el la parkejo, la afero ne koherus. Tio estas la problemo pri loĝado en malperfekta lando: oni ne povas realigi siajn revojn.

*Somera kaj vintra horaroj estas adoptitaj en pluraj landoj kun la celo ebligi pli bonan profiton de la suna lumo kaj redukti la konsumon de elektra energio.

verkis **Viktoro SOLÉ** el Katalunio

Fonto: "La blaga blogo", revuo **Kontakto**, #276, 2016:6, p.16

Franco KAFKO (Franz Kafka) *
La transformiĝo (parto 3)
(daŭrigata)



II

Nur en la vespera krepusko Gregoro vekigis el sia peza sven simila dormo. Li estus certe ne multe pli malfrue eldormiĝinta ankaŭ sen esti ĝenita, ĉar li sentis sin sufiĉe ripozinta kaj findorminta, sed ŝajnis al li, kvazaŭ

lin vekintus hasta paŝo kaj singarda ŝlosado de la pordo kondukanta al la antaŭĉambro. La brilo de la elektraj stratlampoj kuŝis pale ie kaj tie sur la plafono kaj sur la supraj partoj de la mebloj, sed malsupre ĉe Gregoro estis mallumege. Malrapide li ŝovis sin, palpante ankoraŭ mallerte per siaj antenoj, kiujn li nur nun lernis aprezi, al la pordo por vidi, kio okazis. Lia maldekstra flanko ŝajnis unu longa, malagrabla streĉanta cikatro kaj li devis sur siaj du gambovicoj vere lami. Unu gambeto estis cetere, dum la antaŭtagmezaj okazaĵoj, grave vundita - estis preskaŭ miraklo, ke estis vundita nur unu - kaj senvive posttreniĝis.

Nur ĉe la pordo li rimarkis, kio lin vere estis loginta tien; estis laodoro de io manĝebla. Ĉar tie staris pelvo plenigita je dolĉa lakto, en kiu naĝis etaj tranĉaĵoj de blanka pano. Pro ĝojo li preskaŭ ridis, ĉar li havis ankoraŭ pli grandan malsaton ol matene, kaj tuj li mergis sian kapon preskaŭ ĝis super la orelojn enen en la lakton. Sed baldaŭ li retiris ĝin seniluziiginte; ne nur, ke la manĝo, pro lia vunda maldekstra flanko, faris al li malfacilojn - kaj li povis nur manĝi, se la tuta korpo spiregante kunlaboris -, krome la lakto, kiu alie estis lia plej favorata trinkaĵo, kiun certe la fratino pro tio enmetis por li, al li tute ne gustis, ja li preskaŭ abomene sin deturnis de la pelvo kaj rerampis en la ĉambromezon.

En la salono, kiel Gregoro vidis tra la pordofendo, la gaso estis lumigita, sed dum alie ĉe tiu horo la patro kutimis laŭte legi sian posttagmeze aperantan ĵurnalon al la patrino kaj foje ankaŭ al la fratino per forta voĉo, oni nun aŭdis neniun sonon. Nu, eble tiu voĉlegado, pri kiu lia fratino ĉiam al li rakontis kaj skribis, estis lastatempe entute elkutimiĝinta. Sed

ankaŭ ĉirkaŭe estis tiom sensone, kvankam la loĝejo ja certe ne estis senhoma. "Kiom trankvilan vivon la familio do vivis", diris al si Gregoro kaj sentis, dum li rigide antaŭ si gaxis en la mallumon, grandan fieron pri tio, ke li estis povinta havigi al siaj gepatroj kaj al sia fratino tian vivon en tiom bela loĝejo. Sed kiel, se nun la tuta trankvilo, la tuta bonstato, ĉia kontento trovus teruran finon? Por ne perdi sin en tiajn pensojn, Gregoro prefere moviĝis kaj krablis ien kaj reen en la ĉambro.

Unufoje dum la longa vespero flanka pordo kaj alian fojon la alia estis malfermata ĝis fendeto kaj urĝe refermata; iu havis eble la emon eniri, sed ankaŭ tro da hezitaj. Gregoro nun haltis rekte antaŭ la salona pordo, decidinte iel tamen enigi la hezitan vizitonton aŭ almenaŭ ekscii, kiu estis; sed nun la pordo ne plu estis malfermata, kaj Gregoro atendis vane. Frue, kiam la pordoj estis ŝlositaj, ĉiuj volis eniri al li, nun, kiam li malfermitis unu el ili kaj la aliaj dum la tago evidente estis malfermitaj, neniu plu venis, kaj la ŝlosiloj estis enmetitaj de ekstere.

Nur malfrue en la nokto en la salono la lumo estingiĝis, kaj nun estis facile konstati, ke la gepatroj kaj la fratino estis tiom longe maldormintaj, ĉar kiel precize aŭdeblis, ĉiuj tri nun malproksimiĝis piedpinte. Nun certe ĝis la mateno neniu estis enironta al Gregoro; li havis do longan tempon por neĝenate cerbumi, kiel nun reordigi sian vivon. Sed la alta vasta ĉambro, en kiu li estis devigata kuŝi sur la planko, lin timigis, sen ke li sukcesis eltrovi la kialon, ĉar tio estis ja la ĉambro, en kiu li loĝis de kvin jaroj; kaj per movo duone senkonscia kaj ne sen ioma honto li rapidis sub la kanapon, kie li, kvankam lia dorso estis iom premata kaj kvankam li ne plu povis levi la kapon, sentis sin tuj tre hejmeca kaj nur bedaŭris, ke lia korpo estis tro larĝa por esti komplete lokata sub la kanapo.

Tie li restis la tutan nokton, kiun li pasigis parte en duona dormo, el kiu lin ĉiam denove elpelis la malsato, sed parte en zorgoj kaj vagaj esperoj, kiuj ĉiuj tamen kondukis al la konkludo, ke provizore li devas sin teni trankvila kaj, per pacienco kaj granda konsidero, devas al la familio eltenebligi la malagrablaĵojn, kiujn li, en sia nuna stato, ja devis kaŭzi al ĝi.

Jam en la frua mateno, preskaŭ noktis ankoraŭ, Gregoro havis okazon ekzameni la forton de siaj ĵus faritaj decidoj, ĉar el la antaŭĉambro la fratino, preskaŭ komplete vestita, malfermis la pordon kaj enrigardis kun streĉa atento. Ŝi ne trovis lin tuj, sed



kiam ŝi rimarkis lin sub la kanapo - Dio, li devis ja esti ie, li ja ne povis forflugi - ŝi tiom ektimegis, ke ŝi, nekapabla sin regi, rebatfermis la pordon de ekstere. Sed kvazaŭ ŝi pentus pro sia konduto, ŝi tuj remalfermis la pordon kaj, kvazaŭ ŝi estus ĉe malsanegulo aŭ eĉ ĉe fremdulo, enpaŝis piedpinte. Gregoro estis antaŭenŝovinta la kapon ĝis preskaŭ la rando kanapa kaj observis ŝin. Ĉu ŝi rimarkos, ke li lasis la lakton netrunkita, kaj tute ne manke de malsato, kaj ĉu ŝi enportos alian manĝaĵon, al li pli konvenan? Se ŝi ne farus tion propravole, li prefere malsatmortus ol ŝin atentigi pri tio, kvankam li sentis sin terure premata, pafiĝi el sub la kanapo, sin ĵeti al la fratinaĵoj piedoj kaj peti ŝin pri io bona por manĝi. sed la fratino rimarkis tuj kun miro la pelvon ankoraŭ plenan, el kiu estis nur iom da lakto ĉirkaŭe disŝprucigita, ŝi suprenlevis ĝin tuj, kvankam ne per nudaj manoj, sed per ĉifono, kaj ĝin elportis. Gregoro estis ekstreme scivola, kion ŝi alportos anstataŭe, kaj li faris al si pri tio le plej diversajn pensojn. Sed neniam li divenintus, kion la fratino pro sia korboneco vere faris. Ŝi portis al li, por testi lian guston, tutan elekton, ĉion sterninte sur ĵurnalo. Troviĝis malnova duone putrinta legomaĵo, ostoj de la vespermanĝo, ĉirkaŭitaj de blanka saŭco solidiĝinta; kelkaj sekvinberoj kaj migdaloj; fromaĝo, de Gregoro antaŭ du tagoj deklarita nemanĝebla; seka pano, per butero ŝmirita pano kaj pano per butero ŝmirita kaj salita. Krom tio ŝi metis aldone al ĉio ĉi la verŝajne unu fojon por ĉiuj por Gregoro destinitan pelvon, plenigitan je akvo. Kaj pro diskreteco, sciante ke Gregoro ne manĝus antaŭ ŝi, ŝi plej urĝe foriris kaj eĉ turnis la ŝlosilon, por ke Gregoro rimarku, ke li povas senĝene kaj laŭplaĉe konduti. La gambetoj Gregoraj susure movetiĝis survoje al la manĝaĵo. Cetere liaj vundoj jam estis certe tute saniĝintaj, li ne plu sentis ĝenon, li miris pri tio pensante, ke antaŭ pli ol monato per tranĉilo li iomete tranĉis la fingron kaj kiom tiu vundo eĉ antaŭ du tagoj ankoraŭ sufiĉe doloris. "Ĉu eble mi nun havas malpli da sentemo?" pensis li kaj jam suĉis avida je la fromaĝo, kiu lin tuj kaj forte altiris antaŭ ĉiuj aliaj manĝaĵoj. Rapidseke kaj kun okuloj pro kontentiĝo larmplenaj li formanĝis la fromaĝon, la legomaĵon kaj la saŭcon; la freŝaj manĝaĵoj kontraŭe ne gustis al li, li eĉ ne povis elteni ilian odoron kaj eĉ trenis la aĵojn, kiujn li volis manĝi, iom malproksimen. Li estis jam delonge tute fininta kaj kuŝis nur pigre sur la sama loko, kiam la fratino kiel signon, ke li retiriĝu, malrapide turnis la ŝlosilon. Tio lin tuj eksaltigis, malgraŭ ke li jam preskaŭ dormetis, kaj li ree rapidis sub la kanapon. Li devis venki sin mem por resti sub la kanapo eĉ la mallongan tempon, dum kiu la fratino estis en la ĉambro, ĉar pro la abunda manĝo lia korpo

estis iom rindiĝinta kaj en tiu malvastejo li povis apenaŭ spiri. Dum sufokiĝaj krizetoj li rigardis kun iom elŝvelintaj okuloj, kiel la nenion konjektanta fratino kunbalais ne nur la restaĵojn, sed eĉ la de Gregoro tute ne tuŝitajn manĝaĵojn, do kvazaŭ tiuj ankaŭ ne plu estus uzeblaj, kaj kiel ŝi haste ĉion ŝutis en kuvon, kiun ŝi fermis per ligna kovrilo, post kio ŝi ĉion elportis. Apenaŭ ŝi estis sin deturninta, Gregoro sin jam eltiris el sub la kanapo kaj sin etendis kaj ŝveligis sian korpon.

Tiel Gregoro nun ĉiutage ricevis sian manĝon, unue matene, kiam la gepatroj kaj la servistino ankoraŭ dormis, la duan fojon post la ĝenerala tagmanĝo, ĉar tiam la gepatroj same ankoraŭ iom dormis kaj la servistino estis forsendita de la fratino por ia komisiono. Certe ankaŭ ili ne volis, ke Gregoro malsatmortu, sed eble ili ne eltenus ekscii pri lia manĝo pli ol per onidiro, eble la fratino volis al ili evitigi malĝojon eble eĉ nur etan, ĉar fakte ili ja sufiĉe jam suferis.

Per kiaj elturniĝoj oni sukcesis, en tiu unua antaŭtagmezo, senigi sin de la kuracisto kaj la seruristo, tion Gregoro tute ne povis ekscii, ĉar pro tio, ke li ne estis komprenata, neniu pensis, ankaŭ ne la fratino, ke li povis kompreni la aliajn, kaj tiel li devis, kiam la fratino estis en lia ĉambro, sin kontentigi aŭdi nur ie kaj tie ŝiajn suspirojn kaj alvokojn al la sanktuloj. Nur poste, kiam ŝi estis iom kutimiĝinta je ĉio - kompreneble neniam temis pri kompleta kutimiĝo -, Gregoro foje kaptis rimarkon bonintencan aŭ kiu estis interpretebla tia. "Jen hodiaŭ li manĝis kun granda apetito", diris ŝi, kiam Gregoro estis bone honorinta la manĝaĵon, dum ŝi kaze de malo, kio iom post iom plioftiĝis, kutimis diri preskaŭ ĉagrene: "Nun ree ĉio restis."

(daŭrigota)

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/transformigxo.html>

* *Franz KAFKA naskiĝis la 3-an de julio 1883 en Prago, mortis la 3-an de junio 1924 en Kierling [Kirling] (Aŭstrio) estis aŭstra germanlingva verkisto de noveloj kaj mallongaj rakontoj.*

Ne dubu, mia kara!

-- amuze rakontas Maurizio Brucco el Britio

-- "Evo, aŭskultu ! mi devas demandi ion al vi" diris Adamo trifoje faldante sian ĵurnalon kaj formetante ĝin flanken.

-- "Jes, parolu!" diris la pom-manĝema virino.

-- "Ĉu vi scias kial Dio kreis vin?"


-- "Ho Adamo! Ĉu denove tiun historion?" spirblovis Evo.

-- "Ĉar Dio, vidinte min sola, decidis, ke al mi necesos kunulino, iu kun kiu konversacii, iu kiu forigos mian solecon".

-- "Do, kion vi celas?" demandis la unua virino.

-- "Mi ankoraŭ sentas min sole! Vespere vi preskaŭ ĉiam foriras kun viaj amikinoj, kaj kiam vi ne faras tion, vi pasigas vian tempon sidante sur la sofo kaj rigardante tiajn aĉajn televidnovelojn! Iam mi dubas, ke vi intence ignoras min!"

-- "Ne dubu, mia kara, ne dubu!" malice rikanis la rip-devena homino...



MUSO KAJ RATO

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

"Amik', ĉu aŭdis vi pri bona fam'?"
La Mus' alkure laŭte diris:
"Al ungoj de leon' la kato trafis jam!
Jen fine por ripoz' liberon ni akiris!"
"Ne ĝoju, mia frat'!»
Al Mus' respondis Rat':
"Kaj ne esperu absolute.
Se komenciĝos interbat',
Pereos la leono tute:
Plej forta besto estas kat'!»
Multfoje vidis mi, kaj tion mi konfesas:
Timulo timas iun ajn
Kaj kredas, ke timata ŝajn'
La tutan mondon jam impresas.



verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)
Ukrainio

Amuza Matematiko

-- tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

Tri luduloj

Tri personoj ludas tri ludojn.
Ni indiku ilin per A, B kaj C.
La unuan ludon perdas A dum B kaj C duobligas ties monsumojn.
La duan ludon perdas B dum A kaj C duobligas ties monsumojn.
La trian ludon perdas C dum A kaj B duobligas ties monsumojn.
Fine ĉiu persono havas po 24 dolaroj.

Demando : Kiom da dolaroj havis ĉiu persono antaŭ ludoj?

Solvo

Ni incu de la fino. Ĉiu havas po 24 dolaroj.

A 24, B 24 kaj C 24

*Antaŭ la tria ludo la situacio estis tiel:
A 12, B 12 kaj C 48*

*Antaŭ la dua ludo la situacio estis tiel:
A 6, B 42 kaj C 24*

*Antaŭ la unua ludo la situacio estis tiel:
A 39, B 21 kaj C 12*



Nikolai Hohlov – vivo kiel senfine kreata poemo

Lastfoje mi prezentis la rusan poeton E. Miĥalski, ĉiĉfoje mi prezentas lian samlandanon, la poeton Nikolai Hohlov. Iel mi ĉiam kunligas tiujn poetojn en mia menso, iliaj poemlibroj Prologo kaj La Tajdo, kiujn mi ekhavis antaŭ jardekoj, ĉiam staris kune en mia libroŝranko. Malgrandformataj ili estas, modestaj laŭ aspekto, originale personaj laŭ siaj temoj. Kiel poetoj Hohlov kaj Miĥalski estas sentemaj lirikistoj, sed la eksteraj cirkonstancoj evoluigis ĉe ambaŭ socialan konsciencon, kiu influis ilian verkadon.



Nikolai Hohlov naskiĝis en Moskvo en 1891 kaj lernis Esperanton jam kiel junulo. Li studis ekonomion ĉe industria entrepreno. Kiel verkisto en Esperanto li estis aktiva ĉefe en la tria jardeko de la lasta jarcento. Liaj tradukitaj verkoj multe pli ampleksas ol la originalaj, i.a. li tradukis (kun N. Nekrasov) el la rusa la gravan Historion de la Mondolingvo de Ernest Drezen (1928). Liaj originalaj verkoj estas nur du, komedio titolita La morto de la delegito de UEA (1924) kaj la poemaro La Tajdo (1928). Hohlov mortis en 1953.

La Tajdo enhavas nur 38 poemojn. Hohlov citas kiel moton por sia poemaro famajn vortojn de la franca simbolisma poeto Paul Verlaine (1844-96): "De la musique avant tout chose" (Vi devas havi muzikon antaŭ ĉio). Per tio Hohlov certe volas akcenti, ke sonora lingvo, sonora ritmo, estas por li grava elemento de la poezio.

Kaj certe, liaj poemoj abunde atestas tiun vidpunkton. Tamen estas interese konstati, ke – dum la nova generacio de francaj poetoj post Verlaine trovis ties poezion tro virineca, tro gracia kaj tro plaĉa en siaj muzikaj efektoj – la poemoj de Hohlov ĝenerale ne efikas en tiu maniero malgraŭ sia belsoneco. Efektive muzika ritmo ĉe Hohlov malofte regas sola tutan poemon. Pure muzike ritma tamen estas la poemo Vintra fabelo, kiu priskribas sledan veturon en akompano de la amatino. La rimo estas rapida kaj la sonoraj rimoj dance ĝojas:

*Sur la sledo, svelta sledo, post amuza kabaredo,
Kun tintila sonorad'
Ni veturas – aventuras, la ĉevaloj fluge kuras
Sub la stela miriad'.*

--

*Hej, ĉevaloj, hufaj ŝtaloj, kiel rido de cimbaloj
Por dancanta ciganin',
Uraganu, akompanu, dolĉe tiklu, ĝutiranu
Per freneza takto nin!*

Tiaj poemoj efikas tamen nur sur unu nivelo, tiu de bela sonoro, al ili mankas la profundo de tiuj poemoj de Hohlov, kiuj atestas kombiniĝon de lirikismo kaj realismo:

*Mi levas mian kapon en ĉielon,
Sed per piedoj staras sur la ter';
Nur idealojn vidas kiel celon,
Sed nutras min per krudrealaj ver'*

tiel versas Hohlov en poemo titolita Mia vojo. En alia poemo, Chante-claire, la poeto rigardas sin kiel vekanton, kiel kamaradon de la vekokria koko:

Poeto kaj koko anoncu alvenon de ĉiu aŭroro!

Se ne estas tute klare, al kiaj "aŭroroj" aludas la poeto, oni povas en aliaj poemoj pli rekte kompreni, ke socialaj temoj estis proksimaj al lia koro kaj ke li havis esperon pri pli bona vivo por la homoj. En la poemo Eŭropo li priskribas per fortaj vortoj situacion, kie regas veoj kaj lamentoj de suferantoj. Kaj li esprimas esperon pri starigo de nova mondo "de l' paco kaj libero", ke la Laboro restos "reĝino de la tero".

La poeto uzas la titolon de la komenca poemo, La Tajdo, ankaŭ kiel titolon de sia poemaro. Tio montras, ke ĝi havas gravan simbolan signifon. La variaj realaĵoj de la vivo trafluas lian koron alterne kiel la tajdoj de la maro:

*Kaj ŝanĝas sin en ĉiu kora tremo
La kanto de l' batalo kaj kviet',
Kaj tajdas en la sango la poemo
De l' krea kaj eterna Prapoet'.*

Hohlov rigardis la vivon kiel poemon konstante kaj senfine kreatan kaj ke la rilatoj inter la realaĵoj de la vivo, tajde alfluaj kaj defluaj, kaj la poeto de vortoj, estas intimaj kaj samritmaj. Tial la poezio de Hohlov transdonas al la leganto senton de konstanto en vario, kio estas unu metodo por teni sin ĉeflanke de realismo.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko, n-ro 97, 2001)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/hohlov.html>

"Junulino- Universo" el Ĉamerio

Kiam mi vidas frenezan sonĝon
ĉu vere freneza mi estas?
kiam en majesta palaco
subite en alo min trovas?!

Kiom belaj la muzikaj sonoj
ĉirkaŭan etoson ili ekbruligas
ĉiujara konkurso tie okazas
pri Junulino- Universo.

Mi sonĝis ene de sonĝo
tio min vere kapskuis
vidante preterpasante
plej belajn knabinojn de mondo

Angle konkursgvidanto parolas
lia voĉo eĥadas
Junulinon de Universo li proklamas
"Junulino Ĉameria" ja meritas

Mirinda knabino vere ŝi estas
pli ol vera ĉefverko
sed muzikon mi ne komprenas
ĉu gaja aŭ funebra tio estas?!

Kiam ĉaman belulinon li invitas
por surmeti ŝin kronon de reĝino
la alo kaj mondo antaŭ ekrano
antaŭ tiu diino stuporas

Kiuj estas nomoj de viaj gepatroj?
Kiuj estas tiuj bonŝancaj gepatroj?
Mi ne scias belulino respondas
ĉar ili apenaŭ naskiĝi ...povas

Nur la nomon de avo, avino mi
scias

Kiam ĉiu ĉamo kun ili buĉiĝis
iliajn nomojn vi povas trovi
en longaj listoj de Klllogjer (1)

Antaŭ la mondaj ekranoj
Homoj kortremiĝas
kiel eblas oni naskiĝi
el gepatroj jam mortintaj?!

Ho, tio realo ne estas
sed nur imagebla eblo
por ke vere alvenu en vivo
oni ne devus ekzekuti gepatrojn.

Ankaŭ ĉiuj aliaj junulinoj
el la tuta nia globo
povus naskiĝi nur
se oni ne murdus ties gepatrojn.

Jen, vidu Junulinon Kosovo, ŝiaj
gepatroj
mortiĝis antaŭ ol ŝi naskiĝu
kiel junulino el Palestino
kaj ceteraj landoj en Oriento.

Kia junulina ĉarmo el Afganio
kia beleco ankaŭ ĉi tiu junulino
de eblaj gepatroj el Kurdio
gepatroj de ĉi tiu feino mortiĝis de
ISIS0

Vekiĝinte de freneza sonĝo
apenaŭ konsciĝinta
klarvide mi komprenis
ke freneza mi ne estis.

Freneza estas ja ĉi
mondo


kiu nur vorte estas
homeca
mortiganta kaj
etnopuriganta
revenon en patran kamenon ne
permesanta.



Tirana, 26.11.2017

Noto: Ĉamerio estas regiono loĝata
de albanoj aŭtoktonaj, pli frue ol
alveno de grekoj en Balkanio. En la
jaro 1913 tiu regiono aneksiĝis de
Grekio. Grekoj mortigis, buĉis
milojn da ĉamoj kaj forpelis milojn
aliajn disde iliaj teroj kaj ne
permesas al ties posteuloj reveni
en la patraj hejmoj.

(1) Klllogjer: Loko kie oni starigis
memorigilon dedikita al viktimoj de
greka genocido.



Ne manpremu

tradukis Renato Corsetti el Italio

Manpremi ĉiun ĉiam kun insisto
ne vere estas utila afero,
ĉar foje vi devos, jen la tubero,
premi la manon de fia murdisto.

Krome el mano ŝvita kun ulcero
enas virusoj, kiuj sen rezisto
eniras buŝon, malsaniga gisto,
por la stomako, pulmo kaj cetero.

Salutu, do, faŝisme senprobleme
kaj restu sana, pura kaj honesta
kaj vin neniu riproĉos subpreme.

Ĉar tiu gesto signifas esence:
ni ege ĝojas... pro renkonto festa
sed ne aŭdacu tuŝi konfidence.



-- poemo de itala poeto Trilussa,
verkita en la faŝisma periodo
-- tradukis Renato Corsetti el
Italio, por la nuna kronvirusa periodo



PATRINO KUN BEBO, krajono, 30 x 40 cm, 1989

Juna patrino orgojle donis al mi foton de ŝi kun la ĵusnaskita bebo, unua el malsanulejo. Ŝi deziris krajondeseĝnaĵon 30x40 cm, kadritan 40x50. La foto estis bonega, kaj eblis pentri laŭ tiu. La liton el metala tubo malantaŭa kapo mi ne desegnis. Al mi estis grava la rilato inter patrino kaj bebo. Ŝi klinetis la kapon. La dormanta bebo kuŝis en ŝia brako. La tenanta mano, sube maldekstre en la bildo kompletigas la ŝpareman, diagonalan vidon gvidantan kompozicion. La diagonalo gvidas la vidon de la patrino al la bebo ĝis ŝia mano.


La mallonga, malhela krispa hararo de la juna patrino mi nigrigis per mola krajono 6B. Mi uzis diversajn krajonojn. malmolaj - por helaj, delikataj linioj kaj fortaj kontrastoj ellabori en la bildo.

Mia labormaniero estas uzo de krajonoj 9B por molaj, malhelaj - ĝs 9H por malmolaj, fajnaj helaj strioj. Per studado de faka literaturo, libroj pri arto kaj artistoj, rigardado de originaj verkoj de majstroj en muzeo, galerio kaj en Dresdno en kabineto pri kupra gravuraĵo mi ellaboris al mi bazan scion. Ĉiujn el miaj laboroj, ordonitaj mi rigardis kiel defion. Mi diris al mi mem: Per tasko la homo kreskas, kaj trejnado igas majstron. Do antaŭen! Kaj plene da silento koncentrite labori, forgesi la tempon kaj senteme en amo kun animo desegni.

Juste tiu duopa portreto ŝajnis al mi artece sukcesita. Mi intencis ne fordoni ĝin. Pro tio mi desegnis ĝin preskaŭ same kiel propra kopio de mia origina desegnaĵo - ĉifoje por la "patrino". Ĉe la unua forta desegnaĵo mi ĝojigis min mem kaj la vizitantojn de miaj ekspozicioj.

Postvorto

La bildo ornamis la plakaton al varbado de mia ekspozicioj en Ketsch ĉe Rhein kaj Hockenheim 2002. Kaŭze de tiu plakato multe da gastoj venis al la vernisaĝo. En la urbdomo de Hockenheim kantis infanoj de la infanĝardeno de la urbo okaze de la solena vernisaĝo. Mi montris ankaŭ aliajn infanbildojn. Tre emocia mi estis pro tiu honoro. Granda bukedo da rozoj, oranĝkolora kronis ĉion. La delegita ino pri kulturo de mia urbo ĉarme parolis je mia biografio kaj urbo. La trafika asocio Hockenheim aĉetis bildon, mian grandan akvarelon "riverpejzaĝo". Ĝi memorigas al la tiea rivero Rhein. Mi estis pentrinta ĝin dum forpermeso – la riveron Wolga. (Volgo). Ankaŭ la gazetaro ĉeestis. Mi ricevis privatajn ordonojn je portretoj.



de **Helga Plötner**, portretistino, el Germanio

Funebro Por Gandolfo

Olórinu, kiu iam estis...

Sendite de la Lordoj de la Okcidento

Por gardi la landojn de la Oriento

La plej saĝa el ĉiuj Maioj,

Kio pelis vin foriri

Tion, kion vi amis?

Mithrandiro, Mithrandiro o pilgrimo griza

Ne plu vi vagos sur la verdaj kampoj de ĉi tiu tero

Via vojaĝo finiĝis en mallumo.


La interligoj tranĉitaj, la spirito rompita

La Flamo de Anoro jam forlasis ĉi tiun Mondon

Granda lumo, estingiĝis



tradukis kaj sendis **Coşkun Atak** el
Turkio



La malfortaĵo de la vulpo estas en unu punkto, kapharo. Lia kapharo estas iomete maldensa por lia aĝo. Plie ĉar la verto estas maldensa en perfekta rondo, li estas maltrankvila ke ĝi ŝanĝiĝus al la formo kiel dolĉa pastoringo. Ne nur kalvo (kian vorton li ne ŝatas uzi) sed ankaŭ blankaj haroj troviĝas. "Ĝenerale kalvo kaj blanka haro venas aparte, sed nun kune venis al mi. Ambaŭ atako estas tre severa." La vulpo grumblas. Li estas maldolĉa kaj malĝoja.



Li estas respektita kiel saĝulo en la besta vilaĝo, do li ne ŝatas diskoniĝi ke li zorgas pri tio. Sed lin okupas la maltrankvilo pri tio. Li provas sekrete ŝmiri hartonikon kaj plie vaporumas sian haron per vaporumita viŝtuko laŭ la raporto pri la efiko. Li sentas sin mizera kiam li rigardas sin en la spegulo. Ĝi saĝnas ke li tuj aliformigos sin metante folion sur sia kapo. Kompreneble li tute ne faras tion antaŭ lia edzino, kiu devas mokridi lian klopodon. Tamen, kial virina kapo ne kalviĝas? Ni vidas virinojn kun blankaj haroj, sed neniam kun kalvo en la formo de kvazaŭ dolĉa pastoringo. Li pensas la kialon jene: Virinoj estas malsaĝulo, kaj ne uzas kapon. Estas eĉ viro, kiu restas tute fremda al la kalvo kaj blanka haro. Ekzemple vidu lupon kiu estas mizere stulta kaj idiota. Vulpo eksterordinare uzas, alivorte superlaborigas la kapon. Tial vulpa haro nature falas neeltenable pro streĉo, ĉu ne? Li eltiras la blankajn harojn, kiu komencis troviĝi en la pinto de sia vosto. Ankoraŭ li ne povas neglekti kalvon kaj blankan haron. Post longa tempo, li lasos tion ekster atento. Li nun estas juna, do volas sukcesi en sia kariero. La detalo ne povas klarigi unuvorte. Li atendas elkore, ke sia vivo alportos multe da divido. Sed ĝis nun li ne havas iom da kvoto, do ne estus kontentigita se li ne havus pli bonajn. Nun ankoraŭ li ne deziras havi kalvon kaj blankajn harojn. La volo teni sen damaĝo bonan kaj dorĉan dividon elvokas sin tiajn aĝojn. Kompreneble la vulpa haro iomete maldensa, do ĝi ne estus elstara se li atente hararanĝus. Post li ŝmiras hartonikon kaj difortenas viŝtukon, li sekigas sian verton per sekigilo rigardante spegulon de sube. Kiam li mole tenas

harojn supren per kombilo, li faras ĝin en lerta mano timante ke haroj ne falu pro grati krake haŭtan surfacon per aparta forto. Li volas priplanti eĉ nur unu defalintan haron. Ŝajne li bezonas skrupulan atenton ĉe la uzado de sekigilo. Se ĝi estus uzita en inversa direkto, haro povus facile defali. Li ĝentile aranĝas sian hararojn kun la plej granda atento kiel li montras sian inteligentecon kiam li servas la leonon. Povas diri ke lia malfortaĵo estas lia haro kiu devigas lin maltrankviligi. Li estas rigardata kiel ĉiam preta kaj febleca viro al la loĝantoj en la besta vilaĝo, kaj trudas ilin konsideri sin tiel. Li ĉiam kredas ke singardemo estas la plej grava.

Mizere li havas edzinon. Mi antaŭe diris, ke lia malfortaĵo estas havi edzinon. La kialo estas pro tio, ke la vulpo ne havas decidrajton (Turka Stelo, 041, p23). Edzino ne permesas edzon havi decidrajton. La ĉefrolulo de durulromano kaj migrobirdo havas decidrajton ĉar ili ne havas edzinon. Edziĝo estas lia eraro en juneco, mi pensas. Vivi kun edzino desplitas amortize viran pikan karakteron.

La edzino venas al lavejo tuj kiam ŝi ellitiĝis.

Ŝi rigardas lin antaŭ spegulo sekiganta lian verton per sekigilo kun skrupula atento, kaj rideksplodas. Nu en tia okazo, edzino (aŭ pli trafe, virino) estas senindulga. Ŝi diras, "Se vi tial atentus, la efiko estus klare vidite de malantaŭ. Via haro ŝajnas esti velkinta miskanto aŭ somerafina latkurteno. Mi pensas ke kalvo estas ankaŭ bona. Via vana rezisto devas ĉesi. Ĉu vi tiel priatentas?" Li silentas kaj nove aranĝas sian haron per kombilo kaj broso. Ŝi diris, "Ĉu vi deziras kaŝi vian kalvon? Ĝi plie evidentigas blankajn harojn, kaj ankaŭ vian kalvon." Li havas senton, ke li volas mortigi ŝin. Ŝia vortoj pikas lian bruston. Ŝi ŝajne konas ke li estas maltrankvila pri sia kalvo, sed ŝi intence bombardas la vortojn "blanka haro" kaj "kalvo." Fine, ŝi diras, "Iom poste, ankaŭ via frunto povus kalviĝi. Baldaŭ vi povus havi ambaŭan kalvojn, kaj via kapo fariĝus plenkalva. Ĝi povus progresi rapide." "Ne paloru pri ĝi multe foje! Estas malagrabla!" "Kion?" Virino ne reipensas eĉ oni haltigas ŝin, kvankam ŝi paloraĉis ĉion ajn laŭ sia plaĉo. Se ŝi estus riproĉita, ŝi ŝajne repuŝus.

"Estas malagrabla vidi vin, kiu atentus vian kalvon! Ĉu vi ne pensas mem hontinda, kiam vi ĉiu matene regardas spegulon de sube kaj metas vaporumitan viŝtukon sur via kalvo? Mi surpriziĝas pro tio, ke vi hontas sendecideme pri via kalvo, kvankam vi diras arogante. Vi estas tiel vulgara, ĉu



ne?” Lia edzino estas la virino, kiu replikas per deka vortoj por lia unuvorto.

“Estas ankaŭ bone ke mi estas eĉ vulgara. Ne bombardu min per samaj vortoj. Ĉesu paroli!”

“Per kio? Per kio mi ne devas bombardi vin? Per la vorto, kalvo? Troviĝas jam nenia savrimedo por via kalvo. Ĉar vi zorgas pri via kalvo, vi ĉiam estas neimpona. Mi pensis, ke vi sukcesos iomete en via vivo kaj gajnos plimulte. Ĝis nun mi estas kredinta vian esperigan diron.”

“He ho, via voĉo rekte iras tra la fenestro al la najbara domo.”

“Estas bone! Mi komprenas. Tia afero ĉie okazas same. Ni devas toleri reciproke. Mi atendis ke en proksima tago la fortuno ekridos al vi, tamen anstataŭe blankaj haroj aperas. Post sufiĉe profunda konsidero, mi konfirmas ke viaj falintaj haroj estis saĝa kaj akrevida ĉar ili forĵetis ruzan kaj tristan vin.”

Kiam li sentis la edzina strida voĉo trasonoras najbare, li ekdeziras strangoli ŝin.

“Ĉu estas bone diri tiel? Ĉu vi scias, ke viro havas la puntilion?”

“Mi ne scias pri puntilio aŭ punto, sed mi diras kion mi volas diri. Antaŭe vi tuĉis sur via vorto por kovri kalvon malesperinte pro hartonika efekto. Malgraŭ vi estas tia saĝa, kial vi embarasiĝas en la mondo kaj ne povas sukcesi en via vivo? Estas ne rimedoj, ĉar vi ne havas lernokarieron. Oho! Ĉu vi ekkoleras?” Lia edzino ridetas vidante lian vizaĝkoloron.

Ne nur li ekkolerus, sed oni vidus sangon se li trinkus eĉ sakeon. Li ne plu matenmanĝas, kaj eliras el la hejmon. Lia puntilio estas sufiĉe dispremita. Forĵeti edzinon devas esti pli bone ol strangoli ŝin. Viroj defendas sian senteman kaj delikatan puntilion, kaj iel postvivas. Tamen edzino ĝin elprenas, albatas al teron kaj tuj dispecigas per sia piedo.

La vulpo eniras en la kafejon de besta vilaĝo. Malsate li volas manĝi eĉ rostpanon. Tie bestoj, kiu probable ne povis matenmanĝi en sia hejmo, enĵetas urĝe lakton, kafon aŭ lunarkan panon en sian ventron. En ekstrema situacio, iu manĝante kuras rapide al la afercentro en besta vilaĝo. La vulpo surmetas kafon kaj rostpanon sidante antaŭ muro ĉe la angulo. Li havas jam nenian rimedon retransviligi lian koron krom fari tiel. Se la stato daŭrus tiel, li tute ne povus labori en la leona oficejo, kie li devas tro priatenti. Li sentas sin reanimata kiam li ordonas la duan kafon.

Hazarde li sentas rigardon, kaj turnas siajn okulojn. Li surpriziĝas. La leono, lia majstro, okupas dubsence sin ĉe angula mallumetejo kaj kaŝas la vizaĝon per ĵurnalo. Sed ĉio ne povas kaŝi ĉar leono havas longajn harojn kaj barbojn. “Ho majstro! Estas

malofte ke vi iras al eĉ tia loko.” La vulpo ŝanĝas sian seĝon al antaŭ la leono sen trovi alian rimedon. “Ĉit! Bonvolu kaŝi min se eble!” La leono mallaŭte diras kaŝiĝante post ĵurnalo. “Mi timas ke aliaj personoj eltrovu min. la malfaĉilaĵo okazis.” La leono situas la vulpon kiel ŝildon, kaj fine fermas ĵurnalon. Ŝajnas mizere la barboj pendi, la senlumaj okuloj sangadi, kaj la ambaŭ finoj de lipo senkompate descendi. Eĉ la kolharo mizeriĝas senforte. “Kial li tiel malesperiĝas? Ĉu li kanceriĝas? Kiel estas la estonteco de venonta politika potenco?” La vulpo cerbumas. Abrupte lia forto vigliĝas fizike kaj mense. La intrigema vulpo tre amas tian ŝanĝiĝeman staton. “Ĉu via korpo estas malbona?” “Ne.” La leono palpebrumas malforte kaj diras mallaŭte, “Mi konfesas al nur vi. Mi petas vin preni kontraŭrimedon. Sekrete!” “Kompreneble jes!” La vulpo respondas gaje, aliflanke la leono kun mieno plena de amareco flustras ĉe la vulpa orelo, “Fakte, ĉi-matene mi kverelis kun mia edzino tuj post elliĝo.” “Ĉu vere?” “Mia edzino estas obstina. Ĉiuj virinoj ŝajnas estas tia, sed al mia unuvorto ŝi paroladas torente sen spirhalto. Jene, “Kion vi diras? Vastan vizaĝon, malfortiĝan kalvon, barelulon, kaj kurtajn piedojn vi havas. Vi estas afektulo, malrapidemulo, malspritulo kaj trompulo.” “Via edzino ŝajnas resti ankoraŭ sana nur je la buŝo” “Ne nur. Ŝi tiris bruske mian perukon de kolharoj kaj diris laŭplaĉe. Jene “Kio ĝi estas? Via kolharo estas blufa peruko. Vi devas batali per via propra enhavo. Eĉ se kolharo estus maldensa kaj dentego defalus, vera viro batalus per elŝovo kaj ekstraĵo.” “Ĉu via kolharo estas peruka?” “Ha? Eĉ mi havas neeviteblan cirkonstancon. Vi ne devas dispremi mian puntilion maldece.” La leono lamentas malĝoje. “Kiel via diro! Paldonu min!” La vulpo kapjesas profunde. Plie la leono diras, “Virinoj ĝisfunde indikas viran malfortaĵon, kaj hurakrias malnoble. Ili ne havas eĉ dozon da simpatio kaj antaŭzorgo. Ĉu ili ne povus eĉ iomete konsideri kian zorgon ili havus se ili estus dirita tiel?” “Kiel via diro!” Refoje la vulpo kapjesas profunde. “Speciale, ili ne scias, ke viro havas puntilion kaj honoron.” “Ĉu jes?” La vulpo senkonscie seriozas. “Ĉar ili ne havas puntilion. Vera! Estas certe.” La leono diras konvinke. “Se ili havus puntilion, ili devus kompreni viran. Virino ne havas puntilion. Do ili ne scias samurajan kompaton. Ili neniam indulgas, senhezite diras kaj bonhumore triumfas trafite.” “Certe!” La vulpo infektiĝinte je la leona ĉagreniĝo prezentas al si vive la antaŭa indigno. “Virino ne scias indulgon. Kiam mi diras al mia edzino apenaŭ unuvorton “Estimu viran puntilion!”, ŝi diras, “Kio vi diras? Bestoj povas riverenci sidante sur tero timante vian perukan kolharon, sed mi ne timas tion. Via suba korpoparto

estas grasa, do vi ne povas grimpi sur arbo kaj kuri rapide. Se mi ne laborus, ni mortus pro malsato. Vi estas malrapidemulo, malspritulo, hezitemulo kaj nedecidemulo, kaj plie vi estas malkuraĝulo kaj skrupululo. Ĉu vi estas la vera reĝo de bestoj?” “Ĉu vere? Tio ja estas la radikala diro de via edzino!” “Mi levis senkonscie mian manon por bati ŝin.” “Mi komprenas.” “Se ŝi estus ĝentila kaj pentus pri sia ekscesan diron, ŝi ĉesigus la batalon aŭ petus pardonon. Ĉu la ordinara virino farus tiamaniere eĉ se ŝi ne estus ĝentila?” “Povas esti tiel ne ĉiam.” La vulpo diras decide. “Mia edzino estas pli senceda en tiu okazo. Kiam mi levis mian manon, ŝi diris jene, “Vi levis vian manon kontraŭ mi. Batu aŭ mortigu min. Ĉu vi havas kuraĝon mortigi min? Tio estas ridinda. Se vi havus tian kuraĝon, ni povus vivi pli bone.” Mi senkonscie batis ŝin flamiĝe.” “Mi komprenas.” La vulpo ne povas diri gratulon, tamen li elkore ĝojas. “Ĉu ŝi rekonsciiĝis?” “Ne, ŝi fermis siajn okulojn.” La leono diras en morna mieno. “Mi estas maljuna, tamen ankoraŭ tenis la forton en antaŭaj piedoj. Mi batis ŝin kun mia tuta forto, do ŝi forflugis, koliziis kun arbo, kaj senmovis. Mi tuj prizorgis ŝin, sed malfeliĉe ŝia korpo ŝajne fari malvarme.” “Ĉu vere?” “Jes! Traktante ŝin kiel abruptan mortanton, mi petas vin pri konvena dispono.” “Mi komprenas.” “Aranĝu la aferon laŭ via bontrovo ekzemple pri ĝena elefanto.” “Laŭ via diro! Mi kondolencas vin.” “Mi neniel povas esprimi mian humoron per vortoj. Tio devenas tute de la fakto, ke virino ne havas la puntilion kaj honoron. Hej vulpo! Reale, nenian manieron al virino ni havas. Certe mi ne intencis mortigi ŝin. Kun indigno mi rememoras ke ŝi parolis kiel ŝi volas kaj bombastis klaĉe. Troviĝas jam nenia savrimedo. Nur tio estas la rezulto. Duono estas ŝia malfeliĉo de babilado, kaj alia duono estas virina prapeko. Ĉiuokaze profunda emocio ne okazas sen kialo, ĉar mi akompanas mian edzinon dum longa tempo.” “Mi divenas vian koron.”

“Mi farus la grandan funebran ceremonion por ŝi!” “Ĉu ĝi estos la ceremonio de besta vilaĝo?” “Tamen mia bato ankoraŭ restis la iaman forton.” La leono ŝajnas kontentiĝi. “Tia konsidero donas la plej memfidon al mi. Post funebra ceremonio, mi deziras konsulti vin pri mia reedziĝo.” “Kompreneble, jes!”

Kiam la vulpo respondas tiel, ili aŭdas teruran vocon de malantaŭ.

“Kiu reedziĝas? Maljunulaĉo!” Kompreneble la vulpo kaj eĉ la leono preskaŭ rulfalas de la seĝoj. Tie la leonino, edzino de la leono, staris tinkturante ĉirkaŭ sian buŝon kun sango, kaj en kolera mieno. “He ho! Ĉu vi?” La leono vokas ĝoje aŭ desapontiĝe, kaj large malfermas admirajn okulojn. “Ha, kial vi rompis mian dentegon? Tamen mi tute neniam mortaĉas de via

malmaturula bato.” “Estas tre feliĉa, tre feliĉa.” La leono ne scias kiel li respondas, kaj abrupte en lia tono ŝajnas inkludi sonora flataĵo. “Se vi mortus, mi ne povus vivi. Do nun mi konfesas mian koron al la vulpo. Hej vulpo! Ĉu ne?” “Laŭ majstra diro! Via edzo tre ĉagreniĝis.” “Fi! Ĉu la maljunulaĉo havanta maltrankvilan koron paloras ridetaĉe pri reedziĝo? Vi havas grasan suban korpoparton, vastan vizaĝon, kaj kurtajn piedojn. Vi estas barelulo malrapidemulo, malsaĝulo, sendecida, neglektema, etanima, timema afektulo, malrapidemulo, malspritulo kaj trompulo. Se mi mortus per via bateto, tio koncernus mian honoron. Se mi estus mortigita de vi, mi perdus mian puntilion. Mi neniam mortu.” “Ha, mi kapitulacas al vi.” La leono ĝemas preskaŭ agonie.

“Atendu momenton, flatula vulpo! Kien la vulpo malaperis?” La leona edzino diras kaj rigardas malkviete. Tamen la vulpo denaske ne ĉirkaŭvagas. “Mi pensis doni fortan baton al la frivolulo. Hej ci!” La leono estas turmentata de lia edzino kaptate ĉe la brusto.

“Refoe iru al nia hejmo kaj rekomencu denove! Ne baru nian vojon!” La edzino kalcitras svarmiĝantajn spektantojn per piedoj, kaj fortrenas sian edzon. La leono, reĝo de ĉiuj bestoj, ne ŝatas eksponiti antaŭ la okuloj de publiko. “He, liberigu min.” Li mallaŭte petas edzinon. “Ĉu ĝi estas maldeca pozo, ĉu ne? Mia puntilio estas detruita. Bonvolu konsideri mian starpunkton!” “Konsideru ankaŭ mian puntilion! Mi deziras diri kiel vi diris.” La edzino orgojle deklaras tiel, kaj la leono ambigue ekpensas nur unu: virina puntilio ŝajnas esti alispeca kun la vira.

Fonto : “Fabloj de Ezopo” de TANABE Seiko

tradukis kaj sendis **Kacu MATOBA** el Japanio


La kato kaj la pasero

La kato kaptis paseron kaj prepariĝis por manĝi ĝin. La pasero diris al la kato: “Bone edukita kato ne manĝas antaŭ ol lavi al si la vizaĝon.” “Ĝuste”, respondis la kato, “mi tuj faros tion.”

Dume la birdo forfuĝis al branĉo kaj poste mokis la naivan kateton.

La kato ofendite diris: “Alian fojon mi unue manĝos, kaj poste lavos al mi la vizaĝon.”

Ĉiuj katoj en la mondo tiel faras ekde tiu aventuro.



Libero

Jen la gitaro
kiun mi neniam povis tuŝi eĉ iomete
por aŭdi la kanton
serpentantan el la mallumo de l'hieraŭa koro.

Jen la poemo
kun nekomprenebla metaforo
de l'solitara voĉo
de l'diasporo.

Jen la telefono
kiun mi neniam povis uzi
por aŭskulti
liberan voĉon.

Jen la freŝa aero,
kiun mi neniam sentis
en la klostrofobia ĉambro
kie mi loĝis.

Omar Seguna.

Mi kredas

Mi kedas, ke forgesiĝu
l'diktatoroj.
Mi kredas, ke flugos super la
terasoj
la blanka flago.
Mi kredas, ke ne troviĝos
diferenco
inter la sago aŭ la kruco
elirantaj el cirklo,
inter nigruloj kaj blankuloj,
inter la Korano, la Biblio kaj la Torao.

Mi kedas,
ke viŝiĝu la polvo
dum ni progresu.

Omar Seguna

Omar Seguna estas malta poeto, aŭtoro kaj redaktoro de la beletra paĝo ĉe la ĉiudimanĉa, malta gazeto "It-Torĉa" (La Torĉo).



tradukis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto



Dialogo

-- de Julia Sigmond

- Kaj se jam ĉion ni rakontis, pri kio ni parolos?
- Ĉiam ekzistos pri kio paroli.
- Kaj se ne plu estos?
- Tiam ni silentos.
- Kaj tiam ni ne plu amos unu la alian?
- Tiam ni eĉ pli amos unu la alian.
- Kaj tiam ne doloros la silento?
- La silento ne doloras, se ni amas.
- Kaj se la silento doloros?
- Tiam ni denove ekparolos.
- Kaj pri kio ni parolos?
- Pri tio, kial doloras la silento.
- Kaj tiam denove ni amos unu la alian?
- Ĉiam ni amos unu la alian.
- Kaj se ni ne scios, kial doloras la silento?
- Tiam ni kantos.
- Kaj se ni ne konas la kantojn de la alia?
- Tiam ni instruos unu la alian.
- Kaj se ni ne povos lerni ilin?
- Tiam ni aŭskultos la kantojn de la alia.
- Kaj se ni jam ne aŭdos?

- Tiam silente ni rigardos unu la alian.
- Kaj se ni ne plu vidos?
- Tiam ni prenos la manojn de la alia.
- Kaj ankaŭ tiam ni estos feliĉaj?
- Dum ni vivos, ĉar ni amas unu la alian.



Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro atombomboj, tial multaj japanoj opinias, ke Japanio devas gvidi la mondon al sennuklearmila mondo, ratifante “la Pakton pri malpermeso de nukleaj armiloj” adoptitan en la Unuiĝintaj Nacioj la 7an de julio 2017.

Tiu pakto estis malfermita por subskribo la 20an de septembro 2017 kaj post ratifado de 50 ŝtatoj ĝi ekfunkcios. Antaŭ la 28a de februaro 2018, 56 ŝtatoj subskribis, el kiuj 5 ratifis ĝin. Sed strange Japanio rifuzis subskribi la pakton kun jena preteksto:

“Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro la atombomboj, tial ĝi havas la komunan celon aboli nukleajn armilojn. Tamen aliflanke Norda Koreio ekspluatas nukleajn armilojn, kaj tio estas tre serioza kaj urĝa minaco al paco kaj stabilo de la internacia mondo. Al la landoj kiel Norda Koreio, ordinaraj armiloj ne efikas, tial Japanio bezonas subtenon de Usono, kiu posedas nukleajn armilojn, sub la koalicio inter Japanio kaj Usono.

Se Japanio tuj ratifos la pakton, kiu malpermesas nukleajn armilojn, tio damaĝos justecon de la nuklea politiko de Usono kaj danĝerigos la vivon de la japanoj. “

Kontraŭ la japana registaro multaj homoj protestas. Precipe tiuj, kiuj postvivis la atombombadon en aŭgusto 1945, forte deziras, ke Japanio ratifu la pakton. Hodiaŭ mi tradukos spertojn de atombombitoj en Hiroŝima kaj Nagasaki el artikoloj aperintaj en ĵurnaloj.

verkita kaj tradukita de **Hori Jasuo** el Japanio

7) Senbraka pentristo pentras realon de la eksperimentejo de nukleaj bomboj



Tradukita el artikolo de la ĵurnalo Asahi (19an de oktobro 2019).

Kredenco ekstrema kun bruetoj. Radio informas, ke okazis kutima eksperimento de nuklea bombo por paccelo. Ĝi estas eksperimentejo Semipalatinsk en

Kazaĥio, kie Sovetio eksperimentis nukleajn armilojn pli ol 600 fojojn. 90 kilometrojn okcidente s-ro Karipbek Kuyukov naskiĝis sen brakoj. Tio estis influo de elmetiĝo al radioaktiveco. Li pentradis per peniko en sia buŝo homojn falintajn pro eksplodaj ventegoj, fungajn nubojn, amikon kun ŝvelaĵoj sur la vizaĝo ktp.



Lia patro estis ŝoforo. Kiam li naskiĝis, kuracisto rekomendis, ke li estu mortigita per veneno, sed la patro rifuzis tion. Liaj frato kaj fratino mortis tuj post la naskiĝo. «Najbare estis multaj infanoj sen brakoj kaj sen kruoj. Mi devis persvadi min, pensante, ke mi estas pli feliĉa ol ili, ĉar mi povas paŝi.» Tenante krajonon per piedfingroj, li desegnis pejzaĝojn de sia hejmloko.

Fininte la lernejon de librotenistoj en la aĝo de 20 jaroj, li fariĝis bovisto. Fine de la malvarma milito, en 1989, li partoprenis en la movado, kiu celas fermi la eksperimentejon kaj ekspoziciis en Usono kaj en Japanio siajn pentraĵojn temantajn pri la nukleaj eksperimentoj. Okaze de la 70-jariĝo de la komenciĝo de la nuklea eksperimentado en Kazaĥio, en septembro li estis invitita al Japanio por la internacia konferenco kontraŭ nukleaj armiloj organizita de la kazaĥia ambasadorejo.

Li loĝas kun sia fratino 7 jarojn pli maljuna. Li uzas saĝtelefonon per piedfingroj. Li havas ĉirkaŭ 3000 amikojn en Facebook. Al la demando «Se vi povos renaskiĝi, kion vi volas fari?», li respondis, «Mi ne elektos profesion. Mi plej volas havi sanan korpon. Mi forte deziras, ke ni estu la lastaj homoj, kiuj suferas pro nukleaj armiloj.»

Jen resumo de lia parolado en la internacia konferenco «Konstruado de mondo libera de nukleaj armiloj» okazinta en Kazaĥio la 29an de aŭgusto 2016 :

Estas terure scii, ke dum la 40 jaroj okazis 470 nukleaj eksperimentoj. La loĝantoj en Semipalatinsk tiun tempon eliris el sia domo por vidi la eksperimentojn. Ili tute ne sciis pri minaco al sia sano, nek pri la negativaj konsekvencoj pro la krimoj faritaj kontraŭ ili. La loĝantoj estis traktitaj kiel kobajoj. Esploroj pri la flaŭro kaj faŭno estis faritaj. Oni diris, ke radioaktiveco ne influas la flaŭron. Kiel terura mensogo ! Radioaktiveco kaŭzas kanceron kaj leŭkemion. Pli terure radioaktiveco influos 5 aŭ 6 generaciojn.

21 jarojn antaŭe la eksperimentejo en Semipalatinsk estis fermita dank’ al la prezidento Nazarbajev. Mi estas fiera pro tio, ke mi loĝas en

Kazaĥio, la unua lando, kiu forĵetis nuklean frenezecon kaj agadas kiel valora ekzemplo por sennuklea mondo. Mia ĉefa misio estas fari ĉion ajn por ke la homoj kiel mi estu la lastaj viktimoj de

nukleaj eksperimentoj. Mi daŭre alvokados al ĉiuj homoj ĝis mia morto, ke ni havu sekurecon sur nia terglobo. Niaj voĉoj estu unu forta voĉo. Ni postulas eternan ĉesigon de nukleaj eksperimentoj.

S. O. S

-- verkis kaj sendis Ivaniĉka Maĝarova el Bulgario

Mallaŭte li malfermetis la pordon kaj scivole kaŝrigardis en la ĉambron okuleksplorante ĝin. Kontente li konstatis, ke ne eraris. En la ĉambro estis nur du litoj. La unua estis perfekte ordigita kiel lito de soldato. Sur la alia li vidis virinon kun libro en la mano, kiu kaŝis ŝian vizaĝon. Trans la fenestro la maja suno, suprenleviĝinta alte, penetris en la ĉambron kaj ĉirkaŭprenis la litojn kaj noktoŝranketojn per varma aero. La tero ankoraŭ estis malvarma kaj en la ĉambro oni sentis freŝecon. Pro tio la hejtado ne estis malŝaltita. La pordo al la balkono estis iomete malfermita, de kie en la ĉambro oni povus aŭskulti la pepadon de la paseroj. La malsanaj virinoj verŝajne metis sur la kornicon de la fenestro panerojn.

Li eniris kaj stariĝis ĉe la pordo. Post kelkaj minutoj li konstatis, ke neniu rimarkis lin kaj pro tio delikate ektusis. Bedaŭrinde la virino ne reagis. La sunradio ludis en ŝiaj hararoj kaj kolorigis ŝian frizaĵon ruĝkolore.

Li denove tuisis.

“Ĉu mi eraras?” – pripensis li kaj haltis je du kaj tri piedoj antaŭ la lito.

- Devas esti ŝi –diris voĉe li, kio vekis dormantan virinon.

Ŝi fermis la libron kaj metis ĝin sur la noktoŝranketon. La virino provis leviĝi, sed en tiu ĉi momento ŝi rimarkis starantan proksime de ŝi viron. Kunpremis ŝi okulojn kaj eksplorrigardis lin.

- Vi?... O, ĉi?... - per raŭka voĉo diris ŝi kaj sufokiĝis pro larmoj.

- Jes, tiu estas mi. Ĉu vi ekkonis min?

- Vi estas ĉi tie?

- Jes, mi venis. Mi devis veni! Mi devis certiĝi, ke vi bonfartas.

- O, Dio! – ekkriis la virino kaj kovris sian vizaĝon per manoj.

La viro proksimiĝis al la lito, sidiĝetis sur ĝin kaj provis preni ŝiajn manojn en siajn.

Nur kelksekundojn la virino rezistis, sed poste impete interplektis siajn fingrojn kun liaj. La konvulsoj skuigis ŝiajn ŝultrojn.

- Ne ploru, kara! Mi petas! – la viro per milda voĉo petis ŝin kaj forviŝis la larmojn de ŝia vizaĝo. – Ĉio estas for, ĉio estas bona. Vi rapide resaniĝos kaj ĉio pliboniĝos. Vi denove estos sana kaj vigla kaj tial... – li ĉesis siajn pensojn kaj amoplene eksplorrigardis la vizaĝon de la virino. La viro levis

ŝian manon al sia lipo kaj kisis ĝin.

- Kiam vi venis?

- Ĉi matene. Amiko Stefan bonvenigis kaj alveturigis min per aŭtomobilo ĉi tien. Mi devas informi lin pri reveno. Li diris, ke reveturigos min.

- Se vi ne estis en tiu ĉi momento... – la virino denove ekploris.

- Vi bone scias, ke tio nun estas malutila por vi. La kuracisto diris al mi, ke vi jam saniĝas. Li ne erarigos min, ĉar ni estas kolegoj. En tiu nokto li akceptis vin en hospitalo. Li estis deĵoranta.

- Oni diris al mi, ke nur duon horon malfruiĝo kaj estus neevitebla la forpaso –ŝi denove ploreksplodis.

- Ne ploru, karega! Jam ĉio estas fininta. Vi rapide saniĝos!

- Diru, kara, al mi, kiel vi komprenis, ke kun mi okazas io malbona?

- Mi estas kuracisto, kara, ĉu ne? Mi petas vin – forgesu pri tio –li rapide ĉirkaŭprenis ŝin kaj tenere klinis la kapon al ŝi.

- Galena, bonvolu prepari vin por ke mi injektu vin – diris la flegistino enirante en la ĉambron. – Sed unue mi devas haltigi kuracistemon.

Turninte, la flegistino rimarkis starantan viron ĉe la lito.

- Kiu vi estas?- severe ŝi demandis lin.

- Li estas kuracisto, sinjorino flegistino – diris Galena. – Li estas mia Facebook - amiko, s-ro, kiu savis min.

- Ho, sinjoro el fejsjo*! Kie li loĝas?

- Li loĝas en Kanado.

- Kanado? Tie oni parolas anglan lingvon, ĉu ne?

- Jes!

- Vi parolas anglan, Galena?

- Ne, mi ne parolas anglan lingvon.

- Sed, kiel vi komprenas unu la alian?

- Ni parolas esperante.

- Esperante? Kio estas tio?

- Esperanto estas internacia lingvo. Antaŭ 130 jaroj doktoro Ludoviko Lazaro Zamenhof – oftalmologo, pola hebreo kreis tiun ĉi lingvon. La homoj en la tuta mondo povus kompreni unu la alian parolante Esperanton. Ĝi estas facila lingvo. La homoj povas rapide ekposedi ĝin. En nia grupo estas homoj el diversaj landoj – el tuta Eŭropo, Brazilo, Ĉinio,



Japanio, Afriko, Azio k.t.p.

- Stranga estas tio! Vi tute komprenas skribante aŭ parolante tiun ĉi lingvon?

- Jes, tute, estimata flegistino!

- Kaj li venis ĉi tien nur por vidi vin?

- Jes, ni estas amikoj.

- Sed kiel vi konatiĝis?

- Tio estas longa historio. Mi rakontos al vi, sed ne nun.

La flegistino injektis Galena-n kaj eliris el la ĉambro.

Al Galena ne plaĉis tiu ĉi scivolemo de la flegistinoj en la hospitalo. Ŝia okazo estas tre interesa al ili. "Viro el Kanado venis ĉi tien por informi sin pri ŝia sano." Tio kaŭzis al ŝi malkonforton, eĉ doloron. Ĝuste ŝi iomete trankviliĝis kaj ekvivis kun rigardo al la estonteco kaj jen nun nova problemo. Ja estis ĉio tiel normala.

Post la katastrofo, en kiu ŝi subite perdis sian edzon, ŝi estis tute psike frakasita. Longan tempon ŝi estis en hospitalo, eĉ vizitadis psikdoktoron. Iomete saniĝis, sed la koro ĉesis al ŝi bone servi. La doktoro difinis diagnozon: kormalsano. Tio estis rezulto pro la streso, kiu okazis al ŝi antaŭ kvin jaroj. Ili estis bona familio. La harmonio inter ili estis perfekta, ili helpis unu la alian, eĉ profesie. Li estis pentristo. Liaj bildoj vekis intereson kaj en ĝi li trovis kaj prezentis sian filozofion pri la senfina mondo, kiu servis al la bono.

Oni ŝin emeritigis pro malsano. Restis ŝi hejme. De tiu momento komenciĝis nova malfacilaĵo por Galena. Krasimir, ŝia filo, studis en Germanio. Li havis ankoraŭ du jarojn por fini studadon, sed verŝajne li defendos doktordisertaĵon. Ŝi ne deziris obstakli lin. Malpermesis al Krasimir reveni hejmen sen diplomo. Li ne deziris esti kiel patro – pentristo. Allogis lin ekzaktaj sciencoj, pro tio li preferis studi en Germanio.

Ŝia profesio estis muzikistino kaj komencis instrui muzikon en Muziklernejo kiel honorita instruistino al talentaj gejunuloj. Bedaŭrinde tiu ĉi okupo nun estis malsufiĉa por ŝia tre libera tempo, speciale vespere, kiam ŝi restis sola. La televidelsendo ne allogis ŝian atenton. En la programo estis elementaj filmoj, voajorelendoj kaj fikvalitaj realaj programoj. Galena legis sufiĉe bonajn librojn, sed bedaŭrinde ne havis amikinojn, kun kiuj ŝi povus komenti tralegitan. Antaŭ katastrofo ŝi kelkfoje vizitis Faceboog-n, sed nur mallonge. Ne havis tempon kaj ŝiaj interesoj estis aliaj.

Iun vesperon Galena decidis provi denove viziti Facebook-n. Mirigis ŝin, ke ĉi tie en virtuala spaco trovis multajn amikojn eĉ esperantkonatulojn el diversaj landoj. Tre amuzis kiam vizitis la paĝon, sur kiu ŝi tralegis esperantajn humuraĵojn. Tre agrable

surprizis Galena-n la brilanta humuro, skribita de esperantisto kies humuraĵojn ŝi legis en revueto "Penseo". Verŝajne aŭtoro de la humuro estas doktoro, ĉar la temoj estas el la doktorprofesio. Denove ŝi korridetis al liaj spritaĵoj, kaj signis sur la paĝo, ke tre plaĉas al ŝi. Galena skribis kelkajn gratulvortojn pro la afablo, sed sincere. Li tuj dankis al ŝi. Dum la vespero ŝi restis longan tempon en la virtuala spaco. Ŝi ĵus malfermis tableton*ŝi vidis, ke Aleksander sendis al ŝi invitilon por amikeco. Sed Galena ne rapidegis respondi al li, lasis tion realigi matene, kiam unue informu sin, traleginte pri li, sur lia paĝo. Sed Galena bone sciis, ke tio ne estas garanto pri vero, sed...Morgaŭ ŝi tralegis informon pri Aleksander sed ĝi estis malmulte: el Kanado, doktoro, eldonis kelkajn librojn anglan kaj esperante - fabelojn kaj humuraĵojn.

- Koran dankon pro amikiĝo! Mi esperas, ke estos al ni interese! - preskaŭ tuj aperis respondo de Aleksander al ŝia "Jes" sur la paĝo de Galena.

Dum la tempo, kiam la amikeco renkontis ilin ĉiun vesperon en facebookspaco ŝi informis sin pli pri li. Post kelkfojaj malsukcesaj geedziĝoj li rezignis fari familion kaj sin donis al la profesio. Li serenigis enuajn tagojn per skribado de la felietonoj, humurfabeloj, aforismoj kaj anekdotoj, veraj perloj el lia profesio. Galena konfidis lin. Malfermis sian animon kaj konfesis al li sian doloron. Jam ili ne havis sekretojn unu de la alia. Ili eksentis sin parencaj animoj. Sed ilia deziro por renkontiĝi dum la Universala Kongreso ie en la mondo, bedaŭrinde ne realiĝis. Tiel ili restis nur virtualaj amikoj ĝis vespere kiam...

Dum la tago Galena estis tre okupita. Ŝiaj gelernantoj, bonaj estontaj pianistoj, havis koncerton antaŭ publiko. Galena devis konfirmi pere de gelernantoj sian altan klason kiel instruistino. Ĉio estis tre bona, sed en io momento Desislava, ŝia la plej talenta lernantino, ricevis fortan ventrodoloron. Desislava estis centro de la programo. Maltrankviligis tio kaj la aliajn. Galena devis zorgi pri ŝi kaj pri la programo kiu jam komenciĝis. La gepatroj de la gelernantoj same maltrankviliĝis. Neniu helpis ŝin, sed ili nur komplikigis la situacion. Ŝia koro kvazaŭ saltis el la brusto, spiregis, timtremegis pro la streĉo kaj agoro, ke fiaskas tio kion ŝi per granda laboro realigis dum la jaroj kun siaj gelernantoj.

Lasta ŝi eliris el la salono. Sub la langon ŝi metis piloleton. Galena iris sur la malluma strato per pezaj kaj lacaj piedoj kaj en la animo kun maldolĉo.

Tiu tago devas esti la plej ĝoja por ŝi, des pli, ke ŝi havis interkonsenton kun Aleksander. Tiun ĉi vesperon ŝi devus prezenti sian novan diskon kun bulgaraj kantoj tradukitaj en Esperanto. Ĝi estis la

kvina kiun ŝi verkis.

Galena ne havis apetiton. Ŝi vizitis Facebook-n. Li jam atendis ŝin por gratuli okaze de la koncerto. Ŝi konfesis sian fiaskon. Ili ambaŭ aŭskultis diskon kaj tiam okazis io, kion ŝi neniam poste povis rememori. Ŝi nur memoris, ke legis lian laŭdan tekston pri belega disko kaj admiregon de la belega bulgarfolklorkanto sonanta esperante. Galena komencis skribi sur sia tableto* por danki lin kaj rakonti ion pri tiu ĉi bulgara kanto. Bedaŭrinde de tiu momento ŝiaj fingroj mallertis, ŝi ne povis kontroli ilin, la fingroj tremis kaj trenis sur la ekrano. La tableto tuj falis sur la plankon. Ŝi svenis kaj ĉio malaperis.

- Galena, Galena kio okazis?- spektante sensencajn vortojn skribitajn sur la ekrano de lia tekkomputilo, Aleksander tuj komencis skribi demandojn al Galena en ŝia propra paĝo, senĉese, atendente respondon.

Senĉesaj literoj, strekoj, punktoj kaj aliaj simboloj surŝutis malgrandan ekranon.

Li ne hezitis, la doktoro en li tuj reagis.

S.O.S!!!! skribis li sur la ekrano per grandaj literoj kaj sube ŝian nomon. La doktoro skribis same la peton:” Kiu konas ŝin kaj loĝas en Bulgario bonvolu informi min.” Sur la ekrano oni povus legi same eventualan diagnozon: korŝoko. la informo estis skribita esperante, en angla kaj hispana lingvoj. Aleksander atendis kelkminutojn. Neniu reagis. Divenis li, ke la informon metitan nur en la unua loko sur la reto, verŝajne neniu tralegis ĝin. Li komencis skribi persone al ĉiuj ŝiaj amikoj.

La Facebook eksplodis. Post dek minutoj skribis al li multaj uzantoj de la reto, loĝantoj en Bulgario kaj en la sama urbo de Galena. Bedaŭrinde neniu sciis ŝian adreson. Iuj proponis telefoni al Urĝa helpo por ke ili eltrovu ŝian adreson. Aliaj pensis, ke la Urĝa helpo ne povus tion realigi ĉar ili devas zorgi pri multaj malsanhomoj, kiuj bezonas helpon. La tempo pasis, kaj la danĝero pliiĝis. Aleksander perdis esperon kaj bone komprenis, ke en tiu ĉi situacio li estas senhelpa. Se li havus flugilojn.....!!!! Komencis perdi li kaj kuraĝon, ĉiu sekundo estis altvalora. Li daŭrigis skribi ŝian nomon sur la malgranda ekrano en la reto. Sed bedaŭrinde lia ekrano ne reagis. Sur ĝi aperis nek litero, nek signo kiuj montrus, ke estos espero, ke ie – plej, plej malproksime unu amiko atendas helpon, helpon de la amiko.

Stefan tralegis tre interesan artikolon, aperintan en la rubriko “Nova scio” kaj ne sciis kio okazis en la reto. Komprenis, ke iu sendis al li personan mesaĝon, sed la artikolo kaptis tiel lian atenton, ke li ne deziris deŝiri rigardon de ĝi. “La mesaĝo povus atendi”, ekpensi li.. Kiam li tralegis la artikolon kelkminutojn

pensis al kiuj siaj amikoj li povus sendi ĝin. En tiu ĉi momento lian atenton logis la skribaĵo “SOS!” per grandaj literoj en lia babilejo*. Rapide tralegis la tekston skribitan en Esperanto, kaj tuj kaptis sian kapon per manoj.

”Tiu estas patrino de Krasimir, kiu instruis al in Esperanton! – tio estis la unua penso, kiu aperis en lia kapo. Krasimir, lia samklasano kaj tre bona amiko, kiu studis en Germanio. – ”Do... verŝajne li ne scias kio okazis!” – Rapide ekrigardis li de kiu estas mesaĝo.

- O, de Aleksander!!!! Li estas el Kanado, skribanto de la ŝercoj –malpli mirige diris voĉe Stefan. Sed li ne havis tempon rezoni. Rapide li ligis kun doktoro por informi lin, ke li prenas zorgon pri Galena.

Post multaj demandoj kaj precizigoj kun Urĝa helpo ili interkonsentis, ke Stefan asekuris eniron en la apartamenton de Galena. Tio ne estis facila afero por Stefan, sed li bone realigis ĝin.

Sur la soflito ili trovis Galena-n en duonkuŝa stato. Ŝia kapo estis iomete turnita malantaŭen kaj oni ne montris simpton de la vivo. La unua mano pendis malsupren al la planko kaj la alia- nenature estis kurbigita. Sur la planko oni povus vidi tableton turnintan supren je sia ekrano. La ruĝa punkto, supre maldekstre, montris ke baterio estis eluzita.

La doktoro sen meti sian doktortekon sur la tablon, unue ektuŝis, per du maldekstraj fingroj, dormarterion sub la kapo de la kvazaŭ senspira virino.

- La portilon! –ĝoje ekkriis la kuracisto, kaj post sekundoj aldonis pli trankvile – Ni estas je la kriza momento. Estas espero! Rapidegu!

Sen paniko, rapide kaj rutine Galena estis transdonita al la kardiologio.

Pasis noktomezo. Stefan atendis en la vestibulo kaj preĝis por sia amiko kaj lia patrino. Li sciis bone, kio estas vivi sen gepatroj.

- Kion vi atendas? – forpelis la pensojn el la kapo de Stefan la deĵoranta flegistino.

- Mi volis demandi pri Galena – kun ĝeno respondis Stefan.

- Ĉu ŝi estas via patrino?

- Ha, ne. De mia amiko ŝi estas patrino. Li ne estas en Bulgario, pro tio mi estas ĉi tie... sed ankaŭ al la kuracisto el Kanado.

- Ho, la virino de Facebook! Ŝi estas stabila! Vi povus ĝoigi ilin.

- Mi kore dankas al vi!

Aleksander ne povis trovi lokon por si mem. En lia kapo kontraŭdiraj pensoj jen malesperigis lin, jen donis al li esperon ke ĉio estos bone. Ekstere preskaŭ mateniĝis kiam sur lia tekkomputilo kun grandaj literoj estis skribita ESTAS ESPERO!

Ĉio alia okazis tiel rapide, ke Aleksander rekonsciigis kiam li estis en Sofia flughaveno.

Kaj jen li estis ĉi tie, en la ĉambro de Galena, lia virtuala, ĝis antaŭ kelkaj minutoj, amikino. Kaj nun estas vivanta, kun korpo kaj sango, kiun li multe imagis kaj deziris vidi ŝin vivan, tiun, kiu nun estas antaŭ li.

- Ho, ĝis kiam vi estos ĉi tie? - demandis timeme Galena, post kiam la flegistino eliris el la ĉambro.

- Ĉu vi pelis min? - ridante demandis Aleksander al ŝia kontraŭdemando.

- Ne, kompreneble ne, sed... - ne eldiris siajn pensojn Galena klinis kapon sur lian bruston.

Aleksander premis ŝin al si mem serĉante ŝiajn lipojn por kiso.

La pordo lante duonmalfermiĝis kaj en la ĉambron senbrue eniris juna viro. En la mano li portis

nilonan saketon kun produktoj. Li haltis ĉe la pordo kun la okuloj fiksitaj sur la brakuminta paro. Senspiris li kaj restis ĉi tie kelkminutojn. Poste senbrue turnis sin kaj malfermis la pordon malantaŭ si mem. Apogis li dorse al la muro kun okuloj enfokusitaj ien malproksimen. Poste li ekridetis kaj aŭskultis sin mem paroli:

- Dankon, Dio! Mia patrino estas feliĉa!

tableto – malgranda tekkomputilo

babilejo – spaco en Facebooko por propraj mesaĝoj

verkis kaj sendis **Ivaniĉka Maĝarova** el Bulgario

5>> historio – eble la pasinteco de la 20-a jarcenta Grekio – la juna Orestes, kiu jam perdis sian celon kaj la geknaboj, kiuj prezentas la estontecon. Ĉies situacio estas malĝoja. Iutage Orestes rigardante al la maro vidas la grandegan ŝtonan manon, kiun suprenlevas el la maro iu helikoptero. Laŭ Kelkaj komentistoj ĉi tiu estas la mano de Dio. Eble. La rotacianta mano sen montrofinĝro eble montras la sendirektecon aŭ nezorgecon de niaj herooj. Post la malapero de la ŝtona mano Orestes diras al la infanoj: ‘Se mi krius, kiu aŭdus min krom la armeo de anĝeloj?’ Ĉu ĝi estas la soleco de homo, kiu disiĝis de Dio? Eble en la komenco de la filmo la rakonto de Alexandros, kiu ŝajne estas citaĵo el la Biblio estas rilata al tiu sceno. Angelopoulos tute ne estas religiema artisto kiel Tarkovsky. Sed tamen eble li uzis tiujn bildojn de la Biblio. La komento apartenas al la spektantaro.

Fine mi volas gratuli Michalis Zeke (Alexandros) kaj Tania Palaiologou (Voula) pro ilia natura rolkapablo. Belega! En la turka estas diro ‘pligrandiĝis kaj poste malgrandiĝis’. Michalis Zeke estas ĝuste tia ĉarma kaj simpatia ekzemplo. Ankaŭ tiel estas Palaiologou. Evidente Angelopoulos havis tre bonan dialogon kun ili. Vi ne povas ludigi infanojn sen amo. La sceno en kiu la policoj eliras la policejon kaj rigardas la falon de neĝo ŝajne ili estas manekenoj, estas unu el la multaj scenoj specifaj al Angelopoulos. La ĉevalo, la giganta ŝtona mano, la spektado al la neĝo, kaj la arbo en nebulo... Mi scivolemas kion vi pensos se vi spektos ĉi tiun filmon.

Angelopoulos, en la jaro 2012 ĉe Drapetsona distrikto apud Pireo, mortis en akcidento, kiam motorciklo koliziis kontraŭ li. Li estis piediranta sur la ŝoseo dum li filmis sian lastan filmon ‘La alia maro’ (Η άλλη θάλασσα). Li iam diris dum intervjuo: ‘...Esti en

mondo kie valoroj estas komercaĵoj. Iu rakontis al mi pri homoj en Japanio, kiuj subite mortis sen kialo en oficejo. Jen kion ni nomas blankkoluma malsano. Mi mem mortos dum mi filmos...” (ridante). Kaj tiel okazis. Ĉi tiu vida fabel-rakontisto, kiu vivis kune kun sia skipo, kiun li taksis kiel sia familio, kaj kune kun siaj rakontoj heredigis al ni grandan arĥivon. Nun vi estas en senfina vojaĝo Theo! En la kinejo de la kosmo...

* <https://www.youtube.com/watch?v=djyDgPTxugs>

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal** el Turkujo
26-a de aprilo 2020, Büyükkada, Istanbul



Solvo de la krucvortenigmo

O	Ĵ	E	K	V	B		N	O	R	G	O
N	O	V	E	N		N	O	Ĵ	E	R	I
I	V	O	M		Ĵ	O	T	O	P		N
T	U	N		N	O	B	O	B		S	V
U	K		O	Ĵ	E	T	E		V	I	M
S		V	M	O	R	V		O	T	U	R
N	O	K	I	M	V		I	G	I	N	E
I	K	O	R	V		O	T	V	T	E	G

**Eretoj el la lernolibro, vere rekomendinda por
perfekti la lingvoscion,**

„LA TUTA ESPERANTO“

Henrik Seppik

Skeptika vilaĝanino

Maljuna vilaĝanino venis al Moskvo. Kun granda intereso ŝi rigardis la urbon kaj admiris aŭtomobilojn kaj tramojn, ĉar la unuan fojon en sia vivo ŝi estis en granda urbo.

Interalie ŝi vizitis ankaŭ la bestan ĝardenon, kie ŝi vidis diversajn, strangajn bestojn, kiajn ŝi neniam antaŭe vidis. Kiam ŝi fine venis al loko, kie estis du ĝirafoj kun longegaj koloj, ŝi ne povis plu teni sin kaj ekkriis indigne: „Tio estas trompo! Tiaj bestoj ne povas ekzisti!“

Poste oni montris al ŝi kamelon. Kiam la simpla maljunulino ekvidis tiun malbelan beston, ŝi tuj kraĉis kaj kriis: „Ho, tiuj komunistoj! Kion ili faris el la ĉevalo!“

La karaktero de la radikoj

Ekzistas teorio, ke tiuj radikoj, kiuj ne estas uzeblaj sen gramatika finaĵo (ekz. cigar, jun, skrib) per si mem estas nek substantivoj, nek adjektivoj, nek verboj, sed fariĝas tiuj nur post almeto de koncerna finaĵo. Kiam ni almetas al ili la finaĵon „o“, ili fariĝas substantivoj (cigaro, juno, skribo), kun „a“ ili estas adjektivoj (cigara, juna, skriba), kun „e“ adverboj (cigare, june, skribe) kaj kun verba finaĵo ili fariĝas verboj.

Sed tiu ĉi teorio apartigus Esperanton de ĉiuj aliaj lingvoj, kie ĉiu radiko havas certan karakteron, kaj pro tio senbezone malfaciligus ĝian lernadon kaj uzadon. Ĝi kontraŭas ankaŭ nian lingvo-senton: aŭdante, aŭ vidante la radikon „cigar“, ni ne pensas pri kvalito, ago aŭ maniero, sed antaŭ niaj okuloj klare prezentiĝas konkreta objekto; la radiko „jun“ elvokas en ni tuj klaran imagon pri certa kvalito kaj „skrib“ impresas nin sendube kiel ago.

Kaj laste – ankaŭ la praktika lingvo-uzo, precipe la derivado, kontraŭas tiun ĉi hipotezon: la substantivaj kaj adjektivaj radikoj estas nur malofte uzeblaj kun verba finaĵo, kaj ni havas afiksojn, kiuj povas esti uzataj nur kun substantivoj (bo-, ge-, eks-, -ano, -aĉjo, -njo, -estro, -ido, -ino, -aro, -ero, -ingo, -ujo), nur kun verboj (dis-, mis-, ek-, re-, -ado, -ilo,, -ema, -ebla, -inda) aŭ kun adjektivoj (-eco, -ulo).

Patro, patra, patre



Per simpla interŝanĝo de gramatika finaĵo oni povas transporti la vortojn en unu vortklaso en alian, kiel okazas ankaŭ en la naciaj lingvoj, kvankam ne tiel regule kiel en Esperanto. Tiamaniere oni povas el ĉiu substantivo devenigi adjektivon (per la finaĵo –a) kaj adverbo (-e): patro – patra – patre; homo – homa – home; knabo – knaba – knabe; letero – letera – letere; ŝipo – ŝipa – ŝipe; buŝo – buŝa – buŝe; maŝino – maŝina – maŝine; k.t.p.

VORTOJ DE WILLIAM AULD

Esperanto signifas por mi...

Esperanto estas sola lingvo, per kiu mi povas senĝene (kaj sur egala neŭtrala bazo) interŝanĝi ideojn kaj spertojn – ĉu parole, ĉu skribe – kun homoj en la tuta mondo.

Se mi volas uzi, tiucele, mian denaskan lingvon – la anglan – mi estas ĝenata per regionaj dialektoj kaj per fakto, ke fremdlandano ne posedas la anglan sufiĉe bone, por kompreni, se mi parolas normale, tio estas: rapide kaj idiotisme. Mi tro konscias pri lia lingva malsupereco.

Se mi volas uzi, tiucele, la lernitan francan lingvon, mi estas ĝenata per mia stumbla, tre malperfekta posedo de tiu lingvo, per mia ne-indiĝena prononcado kaj per la limoj de mia vortara stoko. Mi tro konscias pri mia lingva malsupereco.

Kiam mi uzas, tiucele, Esperanton, ni ambaŭ uzas lingvon „fremdan“, do, ni renkontiĝas sen lingvaj antaŭjuĝoj. Cetere, Esperanto estas la sola lingvo, kiun ĉiuj personoj kapablas alproprigi perfekte (se ili tion nur deziras), pro la fakto, ke ĝi estas – kompare kun ĉiuj aliaj lingvoj – pli facila kaj antaŭ ĉio regula.

Pere de Esperanto mi povas konstati proprasperte, ke la homoj ĉie estas homoj. Esperanto estas la sola, vere efika ŝlosilo al internacia amikeco kaj interkompreniĝo. Bona volo kaj bona intenco kapablas multon; sed nur komuna lingvo ebligas fundan intimecon.

Esperanto estas ankaŭ la lingvo de mia krea verkado, la esprimilo de miaj esperoj kaj kredoj.

Fonto: **Legolibreto 1** de Jindřiška Drahotová